

Esperanto



Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

102-a jaro • n-ro 1223 (3) • **Marto 2009**

La 94-a UK de Esperanto Bjalistoko, Pollando,

25 julio – 01 aŭgusto 2009

Kongresa Komuniko 2



**Ogroj kaj Mesaĝo de Zamenhof-jaro Kalendaro
pigmeoj Dasgupta kaj Darwin-jaro 2009–2010**

Esperanto

Oficiala organo de

Universala Esperanto-Asocio

(en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

Fondita en 1905 de Paul Berthelot (1881-1910). Establa kiel organo de UEA en 1908 de Hector Hodler (1887-1920).

Redaktoro: Stano Marček.

Adreso de la redakcio:

Revuo Esperanto
p/a Stano Marček, Zvolenská 15
SK-036 01 Martin, Slovakio
☎ +421 43 4222 788

✉ revuo.esperanto@gmail.com;
redakcio@gmail.com

Aperas:

en ĉiu monato krom aŭgusto.

Redaktofino:

la 10-a de la antaŭa monato.

Legata en 120 landoj.

Voĉlegata por vidhandikapitoj.

Abonprezo: varias laŭlande (EUR 38);
informiĝu ĉe via landa asocio aŭ ĉe la CO.
Unuopa ekzemplero kostas EUR 4,00.

Anonctarifoj (EUR): 1 p. 1000, 1/2 p. 550,
1/4 p. 300, 1/8 p. 165, 1/16 p. 90.

Movada rabato 50%.

Anoncoj sur ekstera kovrilo kostas
duoble. Rabato por tuja ripeto 20%.

Bankokontoj: 378964 ĉe ING-bank,
Postbus 1800, NL-1000 BV Amsterdam
(IBAN: NL24PSTB0000378964
BIC: PSTB NL21)
42.60.51.599 ĉe ABN AMRO Bank,
Postbus 949, NL-3000 DD Rotterdam
(IBAN: NL66ABNA0426051599
BIC: ABNA NL2A).

Kreditkartoj:



Adreso de la Centra Oficejo de UEA:
Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ
Rotterdam, Nederlando

☎ +31-10-436-1044,

✉ +31-10-436-1751, ✉ uea@co.uea.org

TTT: <http://www.uea.org>

Ĝenerala Direktoro: Osmo Buller.

Enhavo

- 51 ... Malferme: Ogroj kaj pigmeoj (Mark Fettes)
- 52 ... Kongresa komuniko 2: 94-a Universala Kongreso de Esperanto
- 53 ... Instrumento de supernacilingva komunikado
(Barbara Pietrzak/Maria Wodzyńska-Walicka)
- 54 ... L.C. Zaleski-Zamenhof pri la Zamenhof-jaro
- 55 ... Mesaĝo de Dasgupta al la Unesko-Konferenco
- 56 ... 2009: Zamenhof-jaro kaj Darwin-jaro! Ĉu jam tempo por sciencaj
klasikaĵoj en Esperanto? (José Antonio Vergara)
- 57 ... Zamenhof-jaro 2009: "Mi estas judo" (Josef Šemer)
- 59 ... Kalendaro 2009 – 2010
- 63 ... Recenzoj: Jorge Camacho pri *Postrikolto. Poemoj kaj kantoj tradukitaj;
Dissemitaj floroj*
- 64 ... Nicola Ruggiero pri *Eklipsas*
- 65 ... Laste aperis
- 66 ... Libroservo de UEA en 2008: Lernintoj de Kolker iris al ekzameno
(Osmo Buller)
- 67 ... Oficiala informilo
- 68 ... Solena disdonado de diplomoj en Ĉinio (Augusto Casquero);
Esperanto en du ĉeĥaj fakultatoj (Josef Vojáček)
- 69 ... La nova UEA-ekzameno sukcese premieris
- 70 ... Forpasoj

KOVRILPAĜE: Iluminata fontano en Bjalistoko, la urbo de la ĉi-jara Universala
Kongreso de Esperanto (legu la Kongresan Komunikon 2 sur la p. 52).

Estraro de Universala Esperanto-Asocio

**Prezidanto (kunordigo, ĝenerala
planado):** Prof. Probal Dasgupta, LRU,
Indian Statistical Institute, 203 B.T. Road,
IN-700108 Kolkata, Barato; ☎ +91 33 2359
7731; ✉ probal53@yahoo.com.

Vicprezidanto (eksteraj rilatoj):
D-ro ing. Ranieri Clerici, Via Conte
Verde 66, IT-00185 Roma, Italio;
☎ +39 333 255 19 04, ✉ +39 06 97 600 326;
✉ ranieri.clerici@tin.it.

**Vicprezidanto (kulturo, kongresoj,
edukado):** S-ino Claude Nourmont,
2 Om Kläppchen, LU-5682 Dalheim,
Luksemburgio; ☎ +352 23 66 88 64;
✉ moonmont@pt.lu.

Ĝenerala Sekretario (informado): S-ino
Barbara Pietrzak, Ul. Międzynarodowa
38/40a m 217, PL-03-922 Warszawa,

Pollando; ☎ +48 22 252 79 21 [h],
✉ +48 6000 51 425; ✉ bpietrzak@onet.eu.
Financo, administrado, TEJO: S-ino Loes
Demmendaal, Duikerlaan 160, NL-2903 AC
Capelle aan den IJssel, Nederlando; ☎ +31
10 213 33 20; ✉ L.a.demmendaal@planet.nl.
Landa kaj regiona agado: S-ro Hori Jasuo,
10-27 Simosinden-mati 10-27, JP-371-0822
Maebasi-si, Gunma-ken, Japanio;
☎/✉ +81 27 253 2524;
✉ hori-zonto@water.sanmet.ne.jp.
Faka kaj scienca agado: S-ro José Antonio
Vergara, Casilla 508, Puerto Montt, Ĉilio;
☎ +56 65 256660 [h], +56 65 344606 [of],
✉ +56 994521017;
✉ joseantonio.vergara@gmail.com.
Observanto de TEJO: S-ro Gregor Hinker.
Observanto de ILEI: S-ro Radojica Petrović.

Ogroj kaj pigmeoj

Ci-matene, kiel jam de du semajnoj, la kanada radio parolas pri la morto de pola enmigrinto Robert Dziekanski. En oktobro 2007, Dziekanski trovis sin en la vankuvera flughaveno, sen ajna kompreno de la angla lingvo. Dum dek horoj li vagis tra la dogana halo, ne sciante trovi la elirejon, sen helpo aŭ konsilo. Lia patrino, atendante ekstere, petis serĉi lin plurfoje, senrezulte. Observantoj, aŭdante lin paroli pole al si mem, opiniis lin stranga aŭ ebria. Fine, kiam rompiĝis lia eltenemo kaj li komencis krei kaj panikiĝi, kvar policistoj "pacigis" lin per elektroŝoka pafilo. Li mortis preskaŭ tuj.

Nun okazas enketo. Antaŭ du tagoj, pola interpretisto angligis la lastajn vortojn de Dziekanski. Ili estis la ordinaraj vortoj de ordinara homo, tuj kompreneblaj. Se oni regas la lingvon, per kiu ili esprimiĝis. "Lasu min en paco. Ĉu vi frenezas?" Kaj fine: "Kial?"

Unu forĵetita vivo. Por senti sin plene homo, kaj por traktiĝi kiel homo, oni devas interkomuniki home. Tiun emfazon vi trovos ĉe Zamenhof, longe antaŭ ol virinoj aŭ indiĝenoj rajtis demokratie voĉdoni, longe antaŭ la ekskoloniigo de aziaj kaj afrikaj landoj. "Lingvo neŭtrale homa," li etikedis sian amatan projekton en artikolo post artikolo. "Ne angloj kun francoj, ne rusoj kun poloj, sed homoj kun homoj," li klarigis en Bulonjo. La celo estas simpla. Nur la realigo malsimplas.

Ĉar fakte la lingvaj muroj, kiuj izolis Robert Dziekanski en la flughaveno de Vankuvero, estas ĉieaj; ili kunstrukturis nian mondon. Forgesi tion estas facile, se oni rigardas lingvon nur kiel veston kiun oni surmetas aŭ demetas laŭbezono. Sed lingvoj formas nin, kaj ili formas la instituciojn, kiuj regas niajn vivojn. Ŝanĝi la lingvan ordon signifas certagrade ŝanĝi ĉion.

Kelkajn gravajn elementojn de tiu "ĉio" provis identigi la **Manifesto de Prago**, kiun mi verkis antaŭ pli ol jardeko, kaj kiu ekhavis vivon kaj signifon preter miaj atendoj. Mia komenca celo estis kunmeti informilon, kiu klarigas la socian signifon de Esperanto por aktivuloj de aliaj movadoj. Montriĝis, tamen, ke tia klarigo utilas ankaŭ kaj eble precipe al ni mem.

Mi pensas pri diraĵo de la franca filozofo Michel Foucault: "Homoj kutime scias, kion ili faras, kaj ili ofte scias, kial ili faras tion. Sed ili ne scias, kion faras tio, kion ili faras." Ni ofte trovas nin en tiu situacio kiel esperantistoj. En niaj propraj rondoj, ĉio klaras kaj kompreneblas – eĉ belas. Sed ni ne povas senpere vidi, kiel ni estas kunligitaj kun la granda fluo de socia evoluo ĉirkaŭ ni, kaj do nia movada agado ofte ŝajnas misproportia. En bildo pruntita de William Auld, kiu siavice prenis ĝin de Robert Graves: ni povas senti nin pigmeoj inter ogroj.



Kiuj estas tiuj ogroj nuntempe? Multaj inter niaj vicoj pensos unuavice al la kreskanta influo de la angla lingvo, kies manko pruviĝis mortiga por Dziekanski, kaj al la daŭra eroziigo de malgrandaj lingvoj kaj kulturoj mondscale. Sed tiuj estas nur idoj de gigantaj gepatroj. La hegemonion de la angla, pinte de hierarkio de potencaj lingvoj, akcelas kaj subtenas la superregado de ekonomiaj fortoj, kiuj lasas ĉiam malpli da decidpovo al lokaj, demokratiaj institucioj, kaj kiuj eternigas maljustan dividon de rimedoj inter kontinentoj, landoj, sociaj tavoloj. Kaj tiu ekonomia sistemo mem grandscale minacas la vivo-diversecon sur la tero, ekstermante speciojn je centoj kaj miloj, kaj malfermante pordon al senbrida klimatsanĝo.

Kontraŭ tiuj ogroj, estas facile vidi sin pigmeo. Sed niaj armiloj estas tiuj de la tuta homaro. Demokratio. Diverseco. Homaj rajtoj. Edukado. Komunikado. Libereco. La rimedoj de la eŭropa "epoko de kleriĝo" restas plene uzeblaj, eĉ se ni nun pli klare komprenas iliajn limojn kaj danĝerojn. Kun ili enmane, ni ne povas senti nin izolitaj.

Tion memorigas al ni la praga manifesto. Ĉar tio estas la esenco de manifestoj: ili venigas al la konscio ion, kion ni jam profunde sciis, sed kio ankoraŭ ne klariĝis vorte. Per tiu nova klareco, oni povas rigardi pli vaste kaj longe, kaj ekagi laŭe. Kvazaŭ de ogra perspektivo.


Ni ne subtakso niajn fortojn. Inter la pigmeaj armeoj, ni portas unikan respondecon. Sur la vasta batalkampo, kie ankoraŭ ĉieas la lingvaj dividoj kaj malegalecoj, ni elluktis spacon, kie homo parolas kun homo. Jen la celo kaj senco de la tuta strebo: plene homi. Se oni neglektas la lingvan dimension de tiu homado, aŭ ĝin vidas nur tra la prismoj de potenco kaj popolo, oni maltrafas ion vivgravan. Tio estas la mesaĝo sur nia standardo.

Sed tio ne signifas indiferenti pri la najbaraj luktoj. Male, ni devas lerni de ili, subteni ilin laŭ niaj kapabloj, krei aliancojn; kaj kultivi la demokration, la diversecon, la klerlecon inter niaj propraj vicoj. Tiuj du taskaroj – la ekstera kaj la interna, la politika kaj la kultura – estas du flankoj de unu medalo, egale atentindaj.

Kiuj estis niaj sukcesoj kaj malsukcesoj, laŭ tiuj kriterioj, en la okonjarcento post Prago? Kaj al kio plej bone dediĉi niajn pigmeajn fortojn en la venontaj jaroj? Laŭ mia kompreno, la estraro de UEA volas stimuli debaton pri tiuj demandoj, en la paĝoj de ĉi tiu revuo kaj aliloke. Espereble, la vasta perspektivo de la Manifesto ankoraŭ utilos por levi niajn rigardojn de la propra sulko kaj vidi la tutan batalkampon. Ĉar ni ne miskomprenu: temas ja pri batalo, en kiu la homeco povas finfine malgajni.

Kiel Robert Dziekanski malgajnis, sur betona planko en flughaveno.

Mark Fettes



Kongresa komuniko 2

94-a Universala Kongreso de Esperanto

Bjalistoko, Pollando, 25 julio – 01 aŭgusto 2009

Konstanta adreso

Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Tel.: +31 (0)10 436 1044; fakso: +31 (0)10 436 1751.

Retadreso: kongresoj@co.uea.org.

TTT: http://www.uea.org/kongresoj/uk_2009.html.

Informoj

La modela retejo de LKK enhavas multe da interesaj informoj pri Bjalistoko, Podlaĥia vojevodio, Pollando, transporto ktp. Ĝia adreso estas: <http://94uk.bialystok.pl/>. Por aliĝoj kaj mendoj servas la ĝenerala kongresa retejo de UEA (vd. supre ĉe TTT).

Kongresejo

La kongresejo estos la Bjalistoka Politekniko. La aŭloj kaj diversaj studĉambroj estos uzataj por la kunsidoj. Krome grandega tendo, kun ĉiuj ekipaĵoj necesaj por la komforto de la kongresanoj, funkcios kiel salono Zamenhof, uzata por la inaŭguro, fermo k.a. programeroj celitaj por la tuta kongresanaro samtempe.

Por atingi la kongresejon de la ĉefa (trajna kaj busa) stacidomo de Bjalistoko oni prenu aŭtobuson n-ro 10 ĉe haltejo Dworzec PKP kaj eliru ĉe haltejo Wiejska/Politechnika.

Kongresa temo

La temo de la 94-a UK estas *"Krei pacan ponton inter la popoloj": Zamenhof hodiaŭ*. Per la citaĵo el la parolado de L.L. Zamenhof en la Kembriĝa UK en 1908 ĝi ligiĝas al la 150-a datreveno de lia naskiĝo kaj al la Internacia Jaro de Interpaciĝo. Ĝian traktadon gvidos Humphrey Tonkin kunlabore kun Marc Bavant. Proponojn pri kontribuajoj oni sendu al tonkin@hartford.edu.

Kleriga Tago

Por la sepa fojo okazos en la kongresa lundo la Kleriga Tago. Proponoj pri partoprenigaj programeroj, podiaj diskutoj kaj laborgrupoj, kiuj rilatas ekz. al la movado, lingvoj, informado, organizado, aŭ prelegoj pri nekutimaj temoj, estas bonvenaj ĉe Michela Lipari, michela.lipari@tiscali.it.

Esperantologia Konferenco

Kiel kutime, la Esperantologia Konferenco, organizita de la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED), estos parto de la programo de la 94-a UK. La ĉi-jara konferenco (la 32-a en la serio) pritraktos la vivon kaj influon de L.L. Zamenhof, inklude liajn religiajn kaj filozofiajn ideojn kaj ties kulturan kaj socian fonon. Fakuloj, kiuj deziras kontribui al la temo, bv. kontakti Christer Kiselman, kiselman@math.uu.se (Poŝtkesto 480, SE-751 06 Uppsala, Svedio), plej laste 2009-04-19.

Loĝigo

La loĝiga oferto varias de 4-stelaj hoteloj ĝis studentaj ĉambroj, de € 150,00 en unulita ĉambro ĝis € 15,00 en seslita ĉambro por persono tage. Ili troviĝas en diversaj partoj de la urbo (en la centro, ĉe la strato Zamenhof, ĉe arbaroj, ĉe la kongresejo ktp.). Kelkaj troviĝas en najbaraj urbetoj, kun konekto al la kongresejo per publika transporto. Plena priskribo aperos en la *Dua Bulteno*.

Ekskursoj

Romantika ekskurso tra naturrezervejoj, vizito al Varsovio kaj Krakovo, konatiĝo kun koncentrejo, belaj tagoj en Gdansko kaj Malborko, jen ekzemploj de antaŭ- kaj postkongresaj ekskursoj. Por la dumkongresaj ekskursoj ni elektis la plej belajn itinerojn: Narew-regiono kun sia naturo kaj pola baroko; Valo de Biebrza; Tataro Vojo; Supraŝl kaj la tiea muzeo de ikonoj; k.a. Plena priskribo aperos en la *Dua Bulteno*.

Aliĝoj

Ĝis la 15-a de februaro aliĝis 1275 kongresanoj el 59 landoj. Plej multe da aliĝintoj estis el Pollando (219), Francio (192), Germanio (114), Japanio (112), Nederlando (53), Italio (46), Ĉeĥio (45), Belgio (42), Rusio (38), Brazilo (37), Litovio (31).

Kotizoj

Ĝis la 31-a de marto validos (interkrampe kotizoj laŭ tarifo B): Individuaj Membroj de UEA (NE inkluzivas MG!) € 200,00 (150,00); MG kaj ne-IM de UEA € 250,00 (185,00); komitatanoj/kunuloj/junuloj/handikapuloj, IM de UEA € 100,00 (75,00); kunuloj/junuloj/handikapuloj, ne-IM de UEA € 150,00 (110,00).



Instrumento de supernacilingva komunikado

La konferenco "Esperanto, lingvo justa" ĉe Unesko, kiu en Parizo impone inaŭguris la Zamenhof-jaron (legu pli en la jan. n-ro, p. 11), estis iniciatita de la pola ambasadorino ĉe Unesko Maria Wodzyńska-Walicka. Barbara Pietrzak intervjuis ŝin por nia revuo.

◆ La E-komunumo fiere referencas al la du rezolucioj de Unesko el 1954 kaj 1985. En la unua, kiu agnoskis la rezultojn atingitajn de E-o sur la kampo de internaciaj intelektaj interŝanĝoj kaj proksimiĝo de la popoloj, ĝi komisiis al la Ĝenerala Direktoro de Unesko sekvi la evoluon de la uzado de E-o en la edukado, scienco kaj kulturo, kaj ĉi-rilate kunlabori kun UEA. En la alia, gratulante pro la 100-jariĝo de Esperanto, Unesko petis la Ĝeneralan Direktoron daŭre atente sekvi la aplikon de E-o, kiel rimedon plibonigantan komprenon inter malsamaj nacioj kaj kulturoj. Lastatempe vaste eĥiĝis la konferenco inaŭguranta la Zamenhof-Jaron en la pariza Unesko-sidejo, notita ankaŭ en la kalendaro de la eventoj lititaj kun Internacia Jaro de Lingvoj 2008.

Por mi la eblo aliĝi al la promociado de la E-movado havis apartan signifon. Unuflanke Unesko dum la tuta tempo akcentis – kadre de siaj relative limigitaj ebloj, sed ja tamen – interesiĝon kaj subtenon por la E-movado. Tio estas la unua afero. La alia ligiĝas kun la fakto, ke la konferenco okazis en momento, kiam ni ĉiuj solenis la Internacian Jaron de Lingvoj. Fine temas pri la eblo prezenti, kiom signife estas ligita kun Pollando Zamenhof kaj la tuta E-movado, kaj kiom forta ĉi tiu estas en Pollando. Por mi tio estis tre aparta okazo iusence helpi kaj reliefigi ĉiujn ĉi tri faktorojn kune. Tio estis aparta okazo, ĉar eblis kunvenigi same grupon de tre interesaj parolantoj, kiel ankaŭ interesan grupon de E-entuziasmoj. Tiu vespero estis por mi eksterordinare kortuŝa, ĉar mi havis la senton, ke dank' al ĝi okazas tre bonaj renkontoj, ke tio estas vespero alia ol multaj aliaj renkontiĝoj okazantaj en tiu ĉi konstruaĵo.

◆ Universala Esperanto-Asocio havas komisiitojn por la kontaktoj kun UN kaj kun Unesko, kiuj sekvas la laboron de ambaŭ organizaĵoj sur la platformo de komunaj interesiĝoj. Ekzemple pasintjare la E-komunumo engaĝiĝis en la kampanjo traduki la mesaĝon de la Ĝenerala Direktoro de Unesko por la Monda Tago de la Gepatra Lingvoj en kiel eble plej multajn lingvojn de la mondo. Aŭtune UEA

prezentis sian starpunkton pri la lernado de lingvoj dum la Socia Forumo de la Konsilio de la Homaj Rajtoj. Kelkfoje aŭdiĝas la opinioj, ke esperantistoj kaj UEA enfokusigas nur Esperanton. Dume tiel ne estas. UEA kiel organizaĵo klare deklaras sin por la lernado de la gepatra lingvo, de la loka kaj de la nacia lingvoj. Kvaraloke estas menciita Esperanto. Esperantistoj pledas por la apliko de Esperanto en kontaktoj internaciaj, precipe interhomaj, inter reprezentantoj de diversaj nacioj, kulturoj, religioj. Cetere esperantistoj mem estas plurlingvaj, kaj kono de Esperanto ne limigas ilin lerni naciajn lingvojn. Tio ne estas sufiĉe rimarkata.

Miaopinie la popularigado de la Esperanto-mesaĝo kaj klarigado ĝis kia grado UEA koncentriĝas al la disvastigado de Esperanto kiel instrumento de la supernacilingva komunikado estas eksterordinare grava. Ja tio estas esenca elemento, kiu distingas la Esperanto-movadon de la aliaj. Esperanto estis premisita kiel rimedo je evidenta manko de ekvilibro inter diversaj lingvoj. Neniu emos kompari la signifon de ekzemple la finna lingvo kun la angla, ilia signifo ne estas egala. El tio sekvas la graveco de la ideo de la tria lingvo ampleksanta la tutan homaron parolantan diversajn lingvojn. La graveco de la lingvo donanta certan ŝancon de egaleco. La graveco de la lingvo, kiu evidente estas planlingvo, lingvo kreita de homo, sed samtempe ebliganta liberiĝi de la lingvaj kompleksoj, se diri ĝenerale. Ni vivas en mondo ĉiam pli simila al granda poto, en kiu ĉio kuniĝas kaj miksiĝas. Tial la respekto por la gepatra lingvo, respekto por la lingvoj iusence kondamnitaj al marĝeniĝo en diversaj tutmondiĝaj procezoj, kion ni atestas, estas io enorme grava. Miaopinie temas pri aspekto, al kiu oni donas tro malmultan atenton. Oni tro malmulte parolas pri tio, kion la E-movado havas por proponi rilate al la naturaj lingvoj.

◆ UEA la kontaktojn kun UN kaj Unesko tenas pere de siaj komisiitoj. Ĉu, kaj kiel la t.n. mezaj esperantistoj povus kunlabori sur malpli alta nivelo? Ekzemple sur la ŝtupo de la naciaj Unesko-komisionoj? ➤



La pola ambasadorino ĉe Unesko Maria Wodzyńska-Walicka bonvenigas la publikon en la pariza sidejo de Unesko. Foto: François LoJacom

La naciaj komisionoj estas ligitaj kun la prioritatoj de Unesko, do ili ne kapablas ĉirkaŭpreni ĉiujn sferojn de la kultura aktivado en la plej vasta kompreno de la vorto. Tamen ili estas malfermaj al diversaj problemoj kaj diversbranĉa kunlaboro. Mi do kore instigas esperantistojn en diversaj landoj serĉi kontaktojn kun Unesko, ĝuste sur la platformo de iliaj naciaj komisionoj. Tio estas pli facila ol kontaktiĝo kun la Unesko-centro. La konferenco, kiu okazis 15 dec 2008 estas kaŭzo de miaj ĝojoj kaj kontentiĝo. Unue ĉar mi povis al ĝi kontribui, akiri kunlaboron kaj interesiĝon en tia monda organizo kia estas Unesko kaj inter miaj gekolegoj. Ja en la salono troviĝis tre multaj reprezentantoj de diversaj landoj. Sekve, la kunlaboro kun la Konstanta Reprezentantaro de Litovio ĉe Unesko estis tre videbla, ambaŭ ambasadoj kunlaboris por organizi la eventon. Evidente tio ne estas iniciato, kiun eblas ripeti ĉiutage. Temas pri evento, kiun eblas organizi festokaze. Do tre grava estas la starigo de kanalo por informperado inter la landaj E-asocioj kaj la naciaj Komisionoj de Unesko. Tio ŝajnas al mi afero esenca kaj subteninda.

◆ **Tio estas tre gravaj sugestoj kaj opinioj, pro kiuj ni estas dankaj al vi kaj kompreneble pro la helpo donita por tiom solene inaŭguri nian Jubilean Jaron 2009.**

Mi ankoraŭfoje ŝatas ripeti, kaj bv. ne trakti tion kiel protokolanan ĝentilajn: por mi la konferenco de 15 dec 2008 en la pariza Unesko-sidejo estis solenaĵo tre grava. Mi deziras substreki, ke mi sentis grandan aprezon pro tio, ke mi povis al ĝi kontribui kaj ĝin partopreni. Mi ĝojas, ĉar mi ricevis la impreson, ke plimulto de la partoprenantoj estas vere kontenta. Tio estas io, kio flugigas nian laboron, ĉar malantaŭ ĉiu ĉi-speca aranĝo kaŝigas multajn penojn kaj aranĝendajn aferojn, superantaj la kadron de la ĉiutagaj taskoj. Kaj se videbliĝas ĝojo de la partoprenantoj de tia renkontiĝo por ni temas pri eksterordinara rekompenco. Tion ni spertis dum la konferenco la 15-an de decembro, same mi kiel miaj kunlaborantinoj, ĉar ni vidis, ke ĉiuj bonfartas kaj kontentas pri tiu evento.

En ĉi tiu aparta jaro mi mem deziras samtempe direkti al la tuta, granda, internacia E-komunumo la dezirojn de apartaj sukcesoj, de apartaj motivoj senti kontenton. Tre sukcesan UK-on en Bjalistoko!

Intervjuis Barbara Pietrzak

L.C. Zaleski-Zamenhof pri la Zamenhof-jaro

La Zamenhof-jaro, solene inaŭgurita ĉe Unesko la dekkvina de decembro pasintjara estas la centkvindeka jaro de la vivo de mia avo, Ludoviko Lazaro Zamenhof. Mi insistas pri la vortoj "de la vivo". Ĉar tio signifas, ke Li daŭre estas vivanta, almenaŭ virtuale, vivanta en niaj koroj, danke al Sijaj idealoj, konstante aktualaj. Tiel la idealo de toleremo, de respekto de aliulo malsama, ĉu pro la koloro de lia haŭto, ĉu pro lia religio, ĉu pro lia kulturo kaj pro la lingvo tiun kulturon esprimanta. Li bone konsciis, ke la diverseco, la multnombro de diversaj kulturoj, konsistigas grandan riĉecon de la homaro, riĉecon ĉiuriske savendan. Sed Li ankaŭ konsciis, ke por eviti, ke tiu diverseco nasku malamikecon, necesas havigi al la diversaj socioj eblan komunikilon pere de lingvo neŭtrala, la dua lingvo por ĉiuj, lingvo ne celanta substituiĝi al la lingvoj gepatraj.

Sed kiu Li estas, Ludoviko Lazaro, kreinto, aŭ kiel Li preferis esti nomata, "iniciatinto" de tiu lingvo internacia? De kie Li venas? El kia lando de nia terglobo? Ni povas legi, gravuritan sur unu el Liaj monumentoj, la eltiraĵon de Lia parolado en kiu Li aludis "Litovion, Sian karan patrujon". Tamen, en alia parolado, Li prezentiĝis "filo de Pola tero, tero sur kiu Li naskiĝis, sur kiu Li vivis kaj laboris, tero en kiu Li deziris esti entombigota". Ĉi-rilate la kontraŭdiro estas nur ŝajna. Ĉar la regiono de Bjalistoko, kie Li naskiĝis, estis iam parto de la Respubliko de Du Popoloj, originanta de la Pol-Litova Unio decidita komence de la dekkvina jarcento. Ĝi tiam ampleksis teritoriojn etendiĝantajn inter Balta kaj Nigra Maroj. Ĝin fakte priloĝis ne nur Poloj kaj Litovoj, sed ankaŭ Rutenoj, prauloj de

Belorusoj; Kozakoj, prauloj de Ukrainoj; kaj ankaŭ Judoj, kies multnombra komunumo tie instaligis jam inter la dekkvina jarcentoj. Tamen en la jaro de la naskiĝo de mia Avo la Respubliko de Du Popoloj ne plu ekzistis; la urbo Bjalistoko estis tiam aligita al la regiono de Grodno. Sekve, laŭjure, Zamenhof estis Rusa regato, dum la Juda nacieco estis enskribita en Lia pasporto.



Kiu do finfine Li estas, Doktoro Esperanto: ĉu Polo, Litovo, Ruso, aŭ Judo? Cetere en Hispanio Li portas la medalon de Izabela la Katolika, en Francio Li estas Kavaliro de la Honora Legio, dum multaj monumentoj starigitaj memore al Li, stratoj kaj placoj dissemataj tra kvindekda landoj de la terglobo portas Lian nomon. Li jam respondis: Li estas Homarano, Li do apartenas al la tuta homaro.

Li sekve ĝojas observante la falon de muroj de miljaroj inter la popoloj dividitaj, muroj, kies detruon Li kantis en siaj profetaj poemoj. Li ĝojas observante la popolojn iam malamikajn, formantajn grandan rondon familian tra la tuta Eŭropo kaj baldaŭ tra la tuta mondo. Nur mankas al tiu rondo familia la komunikilo neŭtrala, respektanta lingvojn naciajn, vehiklojn de kulturaj riĉecoj; mankas lingvo internacia, kiu ne penus al ili substituiĝi. Ni esperu baldaŭan malaperon de tiu manko. Ni esperu: la espero estas ja simbolo de nia Esperanto.

Tamen ni ne nur esperu. Ni ankaŭ laboru por kontribui ke la Zamenhof-Jaro, kulminanta en Bjalistoko dum la venonta Jubilea Kongreso, estiĝu grava paŝo sur la vojo al la epoko, kiam homoj nian lingvon parolante ne nur komunikiĝu sed amikiĝu!

Louis C. Zaleski-Zamenhof

Mesaĝo de Dasgupta al la Konferenco

La prezidanto de UEA Probal Dasgupta sendis al la konferenco "Esperanto, lingvo justa" en la pariza sidejo de Unesko jenan mesaĝon.

Sinjorinoj kaj sinjoroj,

Estas granda privilegio povi adresi al vi kelkajn vortojn. Ni dankas al la pola delegacio kaj al la litova delegacio, kiuj kunorganizis kun ni ĉi tiun konferencon pri "Esperanto: lingvo justa" sur la sojlo de la centkvindekara jubileo de la iniciatinto de Esperanto, Lejzer Ludwik Zamenhof. Ĉi tiu konferenco pontas inter du UN-jaroj – la Internacia jaro de lingvoj 2008 kaj la Internacia jaro de interpaciĝo 2009 – kaj ankaŭ la Internacia jaro de lernado pri lingvaj rajtoj 2009. Ni trovas nin evidente ĉe momento, en kiu la temoj de lingvaj rajtoj, de paco kaj de interpaciĝo konverĝas – sur la pioniran figuron de Zamenhof, al kiu la strebado al lingve egalrajta mondo ŝajnis nepre premiso por la paco kaj interpaciĝo.

Kiel vi sendube scias, meti Esperanton kaj ĝian iniciatinton Zamenhof sur la oficialan kulturen mapon de la mondo estis institucia atingo ĝuste de Unesko. Tamen, en 1954, kiam Unesko prie rezolucius dum sia konferenco en Montevideo – aŭ tempe de la centjara jubileo de Zamenhof en 1959 – aŭ eĉ en 1985, kiam Unesko reemfazis sian pozitivan takson pri la kontribuo farita de la Esperanta komunumo al la interkultura kompreniĝo – la internacia komunumo ankoraŭ ne plene konstatis, kion signifos por ni ĉiuj la pionira laboro de Zamenhof.

Se mi rajtas komenci sur la enhava flanko, nur en la lastaj jaroj la internacia komunumo komencis kompreni, ke ne nur la ekonomiaj malegalecoj spronas rankoron, malamikemon kaj militon; ke la malegala aliro al la lingvaj, kulturaj kaj intelektaj rimedoj negative efikas sur la homan bonfarton kaj la internacian stabilecon; ke konservi la lingvan kaj vivan diversecon de la planedo estas nepre, por ke la estonteco ne estu makdonalda. Ĉi tiuj komprenoj estis kernaj al la mesaĝo de Zamenhof kaj animas ĝis hodiaŭ la tagordon de la Esperanta movado.

Se mi transiru de la enhavo al la formo, la civilsocio iniciatis lanĉita de Zamenhof – la Esperanta movado – ne simple lobie turnis sin al la naciŝtatoj. Lia iniciato vartis komunumon, kiu baziĝis sur komunaj kulturaj valoroj, flegas alternativan vivstilon nekonsumisman, kaj kontraŭas blindan akceptadon de la tagordoj de naciŝtatoj. Estas hodiaŭ vaste agnoskate, ke la laboron flegi la valorojn neprajn por la kvalita estonteco de la surtera vivo povas taŭge fari sur la internacia nivelo nur koalicio gvidata de civilsociaj agantoj. Kongrue kun tio, la internacia komunumo – kaj specife Unesko – evoluas al reagordo, kiu donas al la civilsociaj voĉoj egalan rolon en la decidado pri la publikaj strategiarioj.

Grandparte danke al la fortostreĉo, kiun gvidis Unesko tra la tuta 2008, la publiko hodiaŭ pli klare komprenas la gravecon konservi la riskiĝintajn kaj marginigitajn lingvojn kaj protekti la interesojn de iliaj parolkomunumoj. Kiel vi scias, jen demando, pri kiu la Esperanto-movado kerne okupiĝas jam de la tempo de Zamenhof. En la kadro de la ĉi-sektora agado de Universala Esperanto-Asocio – kuna agado kun Unesko ekde 1954 – mi

volus mallonge substreki tri punktojn.

Unue, la aliro de UEA al demandoj rilate la malegalecon ne sekvas metodon de malordiga, plendo-kria agitado kun la celo ĝeni la laboron de aliaj. La esperantistoj ĉiam troviĝis inter la ĉefaj arkitektoj de la pozitiva aliro, laŭ kiu prioritatas la rajtoj kaj disponigendoj. Juna aŭstralia diplomato, la esperantisto Ralph Harry, verkis la unuan malneton de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj, surbaze de kiu oni ĝismarcandis la finan tekston. UEA formale akceptis statutojn pri homaj rajtoj jam en 1947, unu jaron antaŭ la UDHR mem. Al ni gravegas esti parto de la solvo kaj ne parto de la problemo. Ni notas kun plezuro, ke la civilsocio aktivismo ĝenerale nun evoluas al la rajtoj kaj disponigendoj.

Interalie disponigendas al la monda publiko egala aliro al la kultura kaj literatura heredaĵo de la homaro. UEA, reage al la uneska alvoko pri konkretaj paŝoj por antaŭenigi la interkomprenon kulturen, egidis ekde 1961 libroeldonan programon – la serion Oriento-Okcidento. Tiu ĉi specifa korbo da pintaj tradukoj tipe ekzemplas la multe pli grandan tradukaron disponeblan en Esperanto. Mia dua punkto estas, ke la tradukitajaro aperinta en Esperanto estas ŝajne la plej ekvilibre multfonta tradukaro havebla en iu ajn lingvo hodiaŭ. La publika opinio en la Esperanta komunumo aktive apogas ekvilibre multfontan tradukaron kiel celon, diference de la eldonantaro aŭ legantaro en la angla aŭ la franca aŭ la germana.

Mia tria kaj lasta punkto temas pri la esploroj pri la publika strategiario. Kiam UEA rimarkis, ke la socilingvistoj de si mem ne baldaŭ komencos la seriozan esploradon pri la lingvo-elektoj en la publikaj institucioj, ĝia sciencularo, la Centro de Esploro kaj Dokumentado, lanĉis la revuon *Lingvaj Problemoj kaj Lingvo-Planado*, kiu ekde 1969 sukcesis establi la lingvo-politikon kiel gravan sciencan entreprenon kun solidaj efikoj sur la edukon kaj la politikon. Jen tereno, sur kiu UEA intime kunagas kun edukistoj, lingvistoj, politologoj, ekonomikistoj kaj aliaj samentreprenantoj, kiuj ne havas komune kun ni la intereson pri Esperanto. Ni laboras por la intereso de ĉiuj parolkomunumoj en la mondo, ne nur por la disvastigo de Esperanto.

Sinjorinoj kaj sinjoroj, ne estas hazarde, ke niaj pintaj poetoj kutime parolas la hungaran aŭ la islandan aŭ la katalunan. Vi devus rigardi la komunumon de Esperanto-parolantoj kiel ian koalicion, kiu reprezentas la interesojn de la pli malgrandaj lingvoj. Mi fine dankas vin pro tio, ke vi trovis la temon por aŭskulti nin en tiu ĉi grava momento – kiam la internacia komunumo metis sur sian praktikan tagordon la seriozan kaj justan mastrumadon de la lingvaj kaj kulturaj rimedoj de la homaro. Estas por ni granda plezuro labori kun vi ĉiuj.



2009: Zamenhof-jaro kaj Darwin-jaro!

Ĉu jam tempo por sciencaj klasikaĵoj en Esperanto?

Ĉiujare oni gaje festas tra la mondo la 12-an de februaro kiel la Tagon de Charles Darwin, memore al la naskiĝdato de tiu grava angla naturesploranto kaj precipe al lia giganta (kaj skue revolucia!) kontribuado por la racia kompreno pri la deveno kaj ŝanĝoj de la vivo sur la Tero.

Jes ja, ĉar tiel kiel la elstara ukraindevena usona genetikisto Th. G. Dobzhansky iam skribis, "nenio en biologio havas sencon krom sub la evolua prilumado". Fakte la evoluo-teorio estas unu el la plej gravaj historiaj atingoj ne nur de la natursciencoj, sed entute de la ideoj, kun fruktodonaj aplikoj al la esplorado kaj pensado pri multaj aspektoj de la universo, la mondo kaj la homa fenomeno.

Nun la festo daŭros pli longe, ĉar ĝuste en la sama jaro kiam nia Zamenhof naskiĝis, en Londono aperis la unua eldono de la verko *Pri la Origino de Specioj per Natura Selektado*. Do jam antaŭ du jaroj la Internacia Unuiĝo de Biologiaj Sciencoj decidis ke dum 2009 oni festos kaj la 200-jaran datrevenon de lia naskiĝo kaj la 150-jariĝon de la *Origino* kiel la Darwin-jaron.

Belega novaĵo estas ke jam troviĝas en la presejo la Esperanta versio de tiu mejloŝtona verko, eldonata de FEL. Danke al la sindona traduklaboro de Klivo London kaj al la profesieco de unu el niaj gravaj eldonejoj, ni fiere aliĝos al la celebrado, kvazaŭ omaĝe ankaŭ al Zamenhof! Antaŭ proksimume tri jaroj, eksciinte pri lia projekto esperantigi tiun verkon, mi kontaktis Klivon kaj profitante lian ĉeeston en la ISAE-kunsido de la Jokohama UK mi publike gratulis lin.

Interese, la reta *Index Translationum* de Unesco registras nur 91 tradukojn de la *Origino* dum la lastaj 30 jaroj, plejparte al la franca, hispana, portugala, germana kaj rusa, kaj preskaŭ po unu al la itala, turka, japana, korea, malaja, serbo-kroata (tiel!), makedona, dana, norvega kaj kataluna. Antaŭe aperis tradukoj, krom al kelkaj el tiuj samaj lingvoj, al la ĉina, sveda, armena, bulgara, hungara, ĉeĥa, finna, nederlanda, greka, hinda,


pola, hebrea, rumana, slovena, ukraina, litova kaj latva. Nu, kio pri la ceteraj lingvoj de la mondo? Mi tuŝis tiun problemon, nome la mankon de scienca literaturo en multege da etnolingvoj, en mia pasintjara prelego kadre de simpozio pri la nur-anglalingveco de la scienco en multlingva mondo, kiun aro da fakuloj ligitaj al Esperantic Studies Foundation organizis ĉe la jara kunsido de AAAS, unu el la mondscale plej gravaj sciencorganizadoj (vidu *Esperanto* majo 2008). Tiam mi aludis la modelan projekton *Kalima* (كَلِمَة t.e. "vorto") por traduki en la araban 100 sciencajn kaj filozofiajn kernoverkojn.

En Esperanto ni feliĉe jam havas la *Biblion*, *La Noblan Koranon* kaj la *Dharmopadon*, verkojn de Ŝekspiro, Erasmo kaj Tolkien, multegajn literaturajn trezorojn el plej diversaj kulturoj en la Serio Oriento-Okcidento kaj eĉ la *Manifeston* de Marks kaj Engels. Sed ĉu en nia kultura heredaĵo ne devus viciĝi ankaŭ grandaj sciencaj klasikaĵoj, aparte nuntempaj, kiel ekz. iuj verkoj de Stephen Hawking? En tiu prelego mi ankaŭ citis la elstaran usonan pravivo-scienciston Stephen Jay Gould, kiu iam asertis esti konvinkita, ke "tiel kiel Darwin faris publikigante siajn verkojn por vasta legontaro, ni ankoraŭ povas havi ĝenron el sciencaj libroj taŭgaj kaj alireblaj tiel al profesiuloj kiel al interesiĝantaj laikoj (...) per lingvo komprenebla por la inteligenta homo".

La Esperanto-aktivuloj jam de la komenco klopodis ideo ligi ĝin ankaŭ al la esperoj de la marŝado antaŭen de la scienco, kaj tiel homoj kiel Oka Asajirô, la plej elstara japana biologiisto el la 20-a jarcento, kiu i.a. disvastigis en sia lando la evoluo-teorion, frue lernis la lingvon kiam li vivis en Eŭropo dum la 1890-aj. Bedaŭrinde tamen la ĉefflujo de la sciencistoj ne atentis Esperanton. Sed ĉu la oportuna Esperanta eldono de la *Origino* signas novan ŝancon, ĉu ĝi povus esti la unua verko el lanĉota epokfara libroserio por aldoni la sciencon al nia kulturo? Kune kun IKU kaj similaj eventoj, la Esperantaj *Vikipedio* kaj (espereble) *Vikiversitato*,

mi esperas ke ankoraŭ estas troveblaj taŭgaj niĉoj por kontribui per nia lingvo al la demokratiigo de la sciencaj atingoj, ĉar ĉiuj homoj devus ĝui ilin. Ĉu ne, kara LLZ?

José Antonio Vergara



Charles Darwin



Zamenhof-jaro 2009: "Mi estas judo"

Ludoviko Lejzer (Lazaro) Zamenhof naskiĝis antaŭ 150 jaroj en Bjalistoko. Pro tio UEA okazigos en tiu ĉi Pollanda urbo la ĉi-jaran Universalan Kongreson. La polaj esperantistoj prave fieras pri tio, ke la kreinto de Esperanto naskiĝis sur pola tero (kvankam tiutempe Bjalistoko estis parto de la Rusa Imperio). Sed oni ne ofte rakontas al ni, ke Zamenhof mem ne estis polo. En sia lastmonata artikolo pri Zamenhof (*Esperanto*, februaro 2009), Andreas Künzli emfazis prave, ke Zamenhof neniam konsideris sin polo. Ankaŭ ne ruso. Do, kio li konsideris sin?

Kio Zamenhof konsideris sin?

Hodiaŭ ni jam havas sufiĉe multajn dokumentojn (gazetartikoloj, leteroj ktp), en kiuj aperas tre klare la respondo al tiu ĉi demando. Mi citos kelkajn diraĵojn de la kreinto de Esperanto, aperintajn en kelkaj el tiuj dokumentoj:

1. "Jam dum preskaŭ dudek jarcentoj nia popolo migras tra la vasta mondo sen patrujo, sen hejmo, pelata de loko al loko, kiel senhejma orfo, ĉie kuntrenante siajn suferojn, sian eternan 'demandon'". (el la artikolo de Zamenhof *Kion do finfine fari?* aperinta en la ruslingva juda gazeto *Razsvet*, 1882).
2. "Kiel lulilo de nia historia grupo, de nia 'popolo', Palestino estos same kara al hilelistoj, kiel ankaŭ al ĉiuj ceteraj hebreoj, kaj kiam hilelistoj post kelka tempo fortiĝos, ili verŝajne celos akiri kiel proprajn tiun peceton da tero, kun kiu estas ligitaj rememoroj pri la juneco de nia popolo." (el la ruslingva broŝuro de Zamenhof *Hilelismo – Projekto de solvo de la hebrea demando*, 1901).
3. "Mi neniam kaŝas mian hebreecon kaj ĉiuj esperantistoj tion ĉi scias; mi kun fiereco kalkulas min al tiu ĉi tiel antikva kaj tiom multe suferinta kaj batalinta popolo... Paroli detale pri mia vivo kaj pri la historio de miaj ideoj sen konstanta ripetado pri mia hebreeco estas preskaŭ neeble. Se mi ne estus hebreo el la geto, la ideo pri la unuigo de la homaro aŭ tute ne venus al mi en la kapon, aŭ ĝi neniam tenus min tiel obstine en la daŭro de mia tuta vivo." (el letero de Zamenhof sendita al A. Michaux, 1905).
4. "Pro tio, ke ĉiuj hebreoj havas komunan historion kaj la popoloj ne volas komunikiĝadi kun ni, ni tute ne nomu nin rusoj, germanoj ktp, sed nomu nin ĉiam hebreoj laŭ nacieco." (el anglalingva intervjuo kun Zamenhof en *Jewish Chronicle*", 1907).
5. "Sed se la korespondado diras, ke mi hontas pri mia judeco... mi devas kolerege elkrii: tio estas abomeninda mensogo. Ĉiuj esperantistoj en la mondo scias tre bone, ke mi estas judo." (el respondletero de Zamenhof aperinta en la usonjuda jidlingva gazeto *Di Varhajt*, 1912).
6. "Kvankam pro miaj konvinkoj mi ne povas persone partopreni en Viaj laboroj, tamen mia multe suferinta kaj suferanta gento estas por mi ĉiam tre kara." (letero de Zamenhof al Wilhelm Heller,

sekretario de la Tutmonda Esperantista Hebrea Asocio, 1914). Zamenhof naskiĝis en juda (sinonime: hebrea) familio en 'preskaŭ juda' urbo: En 1859 70% de la loĝantoj de Bjalistoko estis judoj (en 1895 – 76%!). Tiu ĉi juda fono tutcerte influis lin. La fakto, ke li en Bjalistoko kreskis inter judoj, ke li parolis denaske la jidan lingvon (apud la rusa), ke li lernis junaĝe la hebrean lingvon kaj la Biblion (Malnova Testamento), ke li konis sufiĉe bone la judajn religion kaj tradicion, ke poste en Varsovio li estis same ĉirkaŭita de judoj (preskaŭ sian tutan vivon li pasigis en la juda kvartalo de Varsovio) ĉio-ĉi ege influis la personecon kaj la mondkoncepton de nia Majstro. Li kreskis ĉe patro, kiu apartenis al la judaj kleruloj, nome konservis – unuflanke – parton de la judaj religiaj devoj, sed aliflanke apartenis al la liberalaj rondoj, nome al tiuj judoj, kiuj deflankiĝis de la ortodoksismo kaj adoptis la ĝeneralan klercon, precipe tiun de la rusa kulturo. La patro Marko verŝajne ankoraŭ havis ankore la konflikton inter la du mondoj, sed la filo Ludoviko jam kreskis en alia epoko, kiam parto de la juda junularo forlasis la religiulan tendaron kaj serĉis la solvon por la problemoj de la judaro per (1) socialismo, aŭ (2) Cionismo (la tiam vekiganta nacia movado de la eŭropaj judoj, kiu celis revenon al la malnova hejmlando Israellando-Palestino), aŭ (3) asimiliĝo ktp.



Kiel savi la judojn

La juna studento Zamenhof, en 1881-2 – la jaroj de la kontraŭjudaj pogromoj – estis ekscitita kaj enprofundiĝis en la demandon kiel savi la judojn. En la komenco li subtenis la ideon, ke la orienteŭropaj judoj devas elmigri Amerikon. Li aperigis grandan artikolon en la ruslingva juda gazeto *Razsvet*, klopodante konvinki la judojn elmigri Usonon. La lasta frazo de la artikolo estis: "Ĝis revido, mia popolo, en la propra ĥato, sur la liberaj bordoj de Misisipo!" Sed ĉar sekvis je tiu ĉi alvoko de Zamenhof multaj akraj engazetaj kritikoj, li sufiĉe rapide ŝanĝis sian opinion kaj fariĝis... Cionisto. Li do tuj poste aperigis en la sama gazeto alian grandan artikolon, en kiu li vokis por enmigrado al Palestino. Zamenhof fariĝis tiam tre fervora adepto de la cionisma liberiga movado. Li dum 3-4 jaroj aktivis en Varsovio sur tiu ĉi tereno. Li estis inter la pioniroj de la societo Ĥibat-Cion en Varsovio (temas pri movado, kiu antaŭis la grandan cionistan movadon de Herzl). En sia fama letero al Michaux (1905) li skribas: "Longan tempon en mia juneco mi estis varmaga 'sionisto'. Mi laboris energie por tiu ideo."

Ĉirkaŭ 1885 li ĉesis okupiĝi pri cionista agado kaj transiris, fakte revenis, al la plej grava sia vivprojekto: la Internacia Lingvo. En 1887 li plene ĉesigis la kontakton kun la cionista movado.

Interesaj estas la vortoj de Gaston Waringhien pri la tiama Zamenhof: "En la unua parto de sia vivo Zamenhof provis akordigi la du pasiojn, kiuj tiutempe dividis lian koron: la judan patriotismon kaj la homecan universalismon. Laborante samtempe kaj paralele por ĉiu el ili, por la bono de la juda gento kaj por la feliĉo de la homaro, li sentis en si ian harmonian ekvilibron kaj trankvilan konsciencan." ("*1887 kaj la sekvo...*", Stafeto, Antverpeno-La Laguna, 1980). La fervora okupiĝo de la juna Zamenhof pri solvo de la problemoj

de la judoj montras, ke li estis granda amanto de sia malfeliĉa hebrea popolo. Dum kelkaj postaj jaroj li ne agis sur la kampo de "savado de la judoj", sed la temo revenis en la komenco de la 20-a jarcento, en formo de Hilelismo.

Projekto de solvo de la hebrea demando

Multaj esperantistoj ne scias, ke la celo de tiu ĉi fama projekto de Zamenhof, kiu antaŭis la pli faman Homaranismon, estis "Projekto de solvo de la hebrea demando". Tio signifas, ke male al la posta 'universala' Homaranismo, Hilelismo celis solvi nur la problemon de la judoj. Mi deziras citi la vortojn de la forpasinta erudicia judo Naftali Cvi Maimon, kiu estis unu el la plej gravaj Zamenhofologoj. En sia tre grava libro *La kaŝita vivo de Zamenhof* li skribas: "Dum la daŭro de multaj jaroj Zamenhof ne ĉesis mediti pri sia ideo. Kvankam fordonita al Esperanto kaj al batalo por la ĉiutaga pano, li trovis tempon por Hilelismo kaj ĉiam denove ĝin pripensis." Zamenhof rigardis la internacian lingvon kiel necesan aldonajon al Hilelismo. En 1901 li aperigis tiun ĉi projekton broŝurforme. Ĝia sorto ne estis favora. Mi deziras substreki kelkajn punktojn, per kiuj Zamenhof 'fermis la cirklon' rilate Cionismon: Dum siaj studentaj jaroj li ja estis arda subtenanto de la juda nacia movado Cionismo, sed en *Hilelismo* la mezaĝa Ludoviko ne plu pledas por Cionismo. Estante jam "kosmopolito" kaj akra kontraŭulo de ĉiu speco de nacionalismo, li skribas, ke "judeco" devas esti nur religio, ne nacio; ke la judan religion oni devas reformi kaj "purigi"; ke la Cionismo estas utopio neefektivebla; ke la hebrea lingvo ne taŭgas por la judoj, ĉar ĝi ne estas viva; ke Esperanto estu la lingvo de la judoj.

Kiel judo loĝanta en Israelo mi permesas al mi deklari, ke almenaŭ rilate kelkajn el la supre menciitaj ideoj, Zamenhof estis tre malbona profeto...

La historio de tiu broŝuro estas kurioza: nur malmultaj esperantistoj konis la verkon pri Hilelismo, pro tio ke ĝi estis ruslingva. Zamenhof skribis, ke li dissendis etan parton de la eldonkvanto al ruslandaj judaj intelektuloj, kaj la ceteron li ricevis de la presejo nur en 1903 kaj kaŝis ĝin en sia ŝranko. Nur en 1972 aperis unuafoje ĝia Esperanta traduko, farita de Holzhaus en iom lama lingvaĵo. Li eldonigis ĝin tiujare ĉe Fondumo Esperanto (Helsinki). Tre verŝajne la sola ekzemplero de la broŝuro estas tiu, kiu troviĝas en la Nacia Biblioteko, Jerusalemo. En 2006 aperis finfine bona traduko de *Hilelismo* far Aleksander Korĵenkov (*Miestas Homo*, Sezonoj, 2006). Sed malgraŭ siaj novaj opinioj pri Cionismo, la mezaĝa Zamenhof plu amis la ideon, same kiel li kore plu favoris la judismon. Li esprimis tion kelkfoje dum siaj lastaj jaroj. Ekzemple, en la supre menciita letero al Michaux li skribas: "...Mi venis al la konvinko, ke tiu ĉi ideo (Cionismo – J.Ŝ.) kondukos al nenia celo kaj tial mi forĵetis tiun ĉi ideon, kvankam en la koro ĝi restis por mi ĉiam kara, kiel agrabla sed neplenumbla revo."

Amafero kun la jida

Zamenhof havis amaferon ne nur kun Esperanto, Cionismo kaj Homaranismo. Li amegis, almenaŭ junaĝe, ankaŭ la jidan lingvon ('judgermana', la lingvo kiu estis uzata tiutempe de la plimulto de la orienteŭropaj judoj). Kiel infano li uzis ĝin hejme kun sia patrino (kun la patro li parolis ruse) kaj surstrate kun la judaj najbaroj. Do li certe regis ĝin perfekte. Dum la jaroj 1879-1881 li dediĉis sin al tiu ĉi lingvo, verkante studaĵojn pri ĝia gramatiko. Temis pri pionira, revolucia projekto – ruslingve verkita – kiun li titolis *Pri jida*

Gramatiko kaj Reformo en la Jida Lingvo. Tiu ĉi verko estis (parte) publikigita nur en 1909 en iu jida revuo en Vilno, sed ŝajne seneŝe. Krom tio, en 1881, la jaro de la pogromoj, Zamenhof verkis kelkajn poemojn en la jida, kiel suplementon al la jida *Gramatiko*. En ili li priploras la suferadon de la juda popolo en orienta Eŭropo.

En sia enkonduko al la jida *Gramatiko* skribas la 22-jara Zamenhof: "Mi amas la tiel nomatan 'jargonon' (jida lingvo – J.Ŝ.) ege... Milionoj da niaj fratoj parolas kaj por longe parolos ĝin... Pro tio ni devas la jargonon serioze trakti." Sed same kiel okazis rilate Cionismon kaj aliajn temojn, la pli aĝa Zamenhof, komence de la nova jarcento, ŝanĝis sian opinion ankaŭ pri tiu ĉi lingvo. En *Hilelismo* li skribas pri ĝi: "...ni venis al konkludo, ke tio ĉi estus afero sen iu celo kaj estonteco".

Interesa temo estas la rifuzo de Zamenhof aliĝi al la ĵus fondita Tutmonda Esperantista Hebrea Asocio en 1914. Responde al ilia invito pri membriĝo li skribas, ke li ne povos aliĝi kiel membro, ĉar kiel homarano li preferas stari ekster iu ajn nacia organizo: "Mi ne povas ligi min kun la celado kaj idealoj de speciala gento aŭ speciala religio." Sed li tamen skribis, ke li tre ĝojas pro la fondo de la hebrea (juda) asocio kaj aldonis: "Mi deziras al vi energion kaj paciencon; se Vi tion havas, tio donos al Vi plej bonan sukceson."

Mi estas hebreo

Antaŭ ol resumi mi deziras aperigi plian citaĵon el lia letero al Michaux: "Ĉar tuj en la komenco de mia rakonto mi devus necese raporti, ke mi estas hebreo kaj ĉiuj miaj idealoj, iliaj naskiĝo, maturiĝado kaj obstineco, la tuta historio de miaj konstantaj bataladoj internaj kaj eksteraj — ĉiuj estas sendisige ligitaj kun tiu ĉi mia hebreeco."

Jen interesaĵo: kiel vi certe rimarkis, mi kelkfoje citis frazojn el la fama letero de Zamenhof al Michaux, kiu lernigas al ni multon pri sia verkinto. Do, tiu ĉi letero el 1905 estis publikigita nur en... 1933, en *Enciklopedio de Esperanto* eldonita en Budapeŝto, sed sen la fragmentoj, kiuj parolas pri la judeco de Zamenhof. Ili estis plene forigitaj – memoru la tiaman Eŭropon kun ĝia antisemitismo! La redaktoro G. Waringhien klarigis poste, ke la letero estis cenzurita de la eldonistoj. La kompleta letero aperis nur en 1948 kadre de la *Leteroj de L. L. Zamenhof* kompilitaj de la sama Waringhien.

Resume: ni vidis, ke Zamenhof estis ege influata de sia judeco, ke li estis konscia pri tiu afero, kaj ke li kelkfoje substrekis tion skribe. Tamen mi opinias, ke pravis Maimon per la jenaj vortoj: "La demando, kiu nun leviĝas, estas jena: Se Polujo estis la lando de lia loĝado, se li sentis Litovujon sia patrujo, se laŭ nacieco li sin alkalkulis al la juda popolo: al kiu li apartenas? Nia respondo estas simpla: Li apartenas al neniu, krom al si mem. Sed la plej trefan respondon donis Zamenhof en la fino de sia Kongresa Parolado en Bulonjo-sur-Mar, 1905: 'Sed tiel same kiel mi en la nuna momento ne estas ia naciano, sed simpla homo, tiel same mi ankaŭ sentas, ke en tiu ĉi momento mi ne apartenas al ia nacia aŭ partia religio, sed mi estas nur homo.'"

Josef Šemer

Bibliografio:

Miestas homo. L.L. Zamenhof. (Red. Aleksander Korĵenkov). Kaliningrado 2006. *Zamenhof-strato, La*. (Roman Dobrzyński). Kaunas 2005 (2-a eld.). *Doktoro kaj lingvo Esperanto*. (Adolf Holzhaus). Helsinki 1969. *La kaŝita vivo de Zamenhof*. Originalaj studoj. (N.Z. Maimon). Tokio 1978. *1887 kaj la sekvo... Eseo IV*. (Gaston Waringhien). Antverpeno-La Laguna 1980. *Historio de Esperanto*. (Aleksander Korĵenkov). Kaliningrado 2005.

Malgraŭ kontrolo kaj komparo kun aliaj kalendaroj ne eblas garantii la fidindecon de ĉiuj informoj en la kalendaro, pri kiuj respondecas nur la organizantoj. La venonta kalendaro aperos en la julia numero.

marĉo

06-08: 5-a Ibera Renkontiĝo en Oporto, Portugalio. "Ni babilu, promenu, kleriĝu, festumu.... Esperante." <http://esperanto.pt/ir2009/>; kunvenu@gmail.com.

06-09: Studsemajnfino en Schoonloo, Nederlando. En ĉiu aĝo kaj nivelo. studosemajnfino@esperanto-nederland.nl.

16-21: Staĝo de Esperanto en Nilvange, Francio. Staĝo por komencantoj, perfektiga kaj konversacia, ekskursoj posttagmeze (Thionville, Luksemburgo), kultura vespero. francaFervojistaEsperanto-Asocio@esperanto-thionville.fr, 8 rue Pasteur, FR-57240 Nilvange, Francio. stage.esperanto.laposte.net.

aprilo

03-05: 4-a Sabla Printempo en Písek, Ĉeĥio. Trejnseminario "Esperanto en Interreto", Lingva festivalo, turisma kaj muzika programoj. esperanto.pisek@seznam.cz.

03-06: 2-a Mezorienta Kunveno en İznik, Turkio. Renkonti samideanojn, partopreni diskutojn, aŭskulti prelegojn kaj turismumi en belega ĉirkaŭaĵo, kun mezorientanoj kaj alimondpartanoj! [RenatoCorsetti, Murat Özdzidar, Tom Juval](mailto:RenatoCorsetti@murat.ozdizdar.com). <http://arabujo.afriko.org/mk/starto.php>; mezorienta.kunveno@gmail.com.

08-14: 33-a IJF (Internacia Junulara Festivalo) en Giulianova, Italio. La tradicia paska renkontiĝo organizata de la Itala Esperantista Junularo pritraktos ĉi-jare la temon "Eŭropa integriĝo". [IEJ, Michael Boris Mandirola](mailto:IEJ@micahelborismandirola.it), <http://iej.esperanto.it/ijf/2009/>; ijf.admin@esperanto.it.



09-12: Kekso en Creglingen, Germanio. Renkontiĝo por junuloj inter 15-25 jaroj kaj sen partoprenkotizo, ĉar ĝi estas subvenciata! [Kekso, Am Kreuzberg 5, DE-63776 Mömbris, Germanio](mailto:Kekso@amkreuzberg.de). www.esperanto.de/kej/sub_18.html; jampgade@web.de.

10-17: 25-a PSI (Printempa Semajno Internacia) en St. Andreasberg, Germanio. Granda paska renkontiĝo por la tuta familio, paroj kaj unuopuloj en ĉiu aĝgrupo. [Jörg Gersonde, Hermann-Wäschke-Str. 31, DE-06366 Köthen, Germanio](mailto:JörgGersonde@hermann-waeschke-str.de). [+49\(0\)34 96-55 85 17](tel:+4903496558517), [+49\(0\)18 050-55 11 00 29 72](tel:+49018050511002972). www.esperanto.de/psi/; psi@esperanto.de.

11-14: 64-a Kongreso de SAT-Amikaro en Pau, Francio. SAT-Amikaro, franclingva LEAO de SAT. [OKK SAT-Amikaro, 40 rue Pasteur, FR-64000 Pau, Francio](mailto:OKK@sat-amikaro.fr). www.esperanto-sat.info/rubrique101.html; satamikaro2009@gmail.com.

11-18: FRInGoj 2009 en Baugé, Francio. [Elisabet' Barbay, 25 allée Gabriel Fauré, FR-93140 Bondy, Francio](mailto:ElisabetBarbay@wanadoo.fr). [+33\(0\)1 48 47 23 87](tel:+330148472387). Eliz.Barbey@wanadoo.fr.

14-18: Printempa staĝo en Kvinpetalo. Preparado al kapableco (pedagogio) kun Renée Triolle, al Atesto pri supera lernado (literaturo) kun MH Desert, unuagrada kurso (B. Lagrange). [Kvinpetalo, FR-86410 Bouresse, Francio](mailto:Kvinpetalo@fr-86410bouresse.fr). [+33 5498074](tel:+3335498074) www.kvinpetalo.org; informoj@kvinpetalo.org.

14-19: Printempa lingva seminario de AEH en la pensiono Espero en Skokov, Ĉeĥio. nechvilep@seznam.cz.

17-20: 90-a Brita Kongreso. Celebru la 150-an naskiĝdatrevenon de D-ro Zamenhof en la kongresejo Sarum College, Cathedral Close, Salisbury. [Esperanto-Asocio de Britio, Esperanto House, Station Road, Stoke-on-Trent, ST12 9EJ Britio](mailto:Esperanto-Asocio@britio.org). http://esperanto-gb.org/eab/eab_events.htm; eab@esperanto-gb.org.

18-19: Esperanto-Semajnfino Monterrey en Guadalajara, Meksiko. Regiona Semajnfino por Esperanto-parolantoj kaj interesitoj. [Denice Maldonado](mailto:DeniceMaldonado@esperanto-mexico.org). www.esperanto-mexico.org; aprilo2009@esperanto-mexico.org.

18-26: 34-aj Esperanto-Tagoj de Bydgoszcz kun 32-a AKB-Sesio kaj Internacia Kurso por Esperanto-vojaĝgvidantoj en Bydgoszcz, Pollando. [Internacia Centro pri Kulturo kaj Turismo, str. M.Skłodowskiej-Curie 10, PL-85-094 Bydgoszcz, Pollando](mailto:InternaciaCentro@priKulturokajTurismo.pl). [+48 052\)3461151](tel:+480523461151), esperanto-turismo@wp.pl, andreo@rubikon.net.pl.

20-24: Printempa staĝo en Kvinpetalo. Naturkuracado kun Harald Schicke. Muziko kaj danco el Koreio kun Song Gông-Ok. [Kvinpetalo](mailto:Kvinpetalo@v.14apr) (v. 14 apr).

24 apr – 03 maj: 30-a Internacia Riverirado per kanuoj sur Tibero de Citta' di Castello ĝis Romo. Neesperantista aranĝo, sed kun la eblo organizi E-renkonton. Facila rivero, sufiĉa bona naĝkapablo sen antaŭa sperto pri kanuoj. sandro@kri.it.

25: Malferma Tago. CO de UEA (v. p. 67).

25-26: Jarkunveno de Dana Esperanto-Asocio, Danio. [Dana Esperanto-Asocio](mailto:DanaEsperanto-Asocio@danio), Danio. [Dana Esperanto-Asocio](mailto:DanaEsperanto-Asocio@danio).

Vestavej 4, DK-2770 Kastrup, Danio. www.esperanto.dk; dea@esperanto.dk.

27 apr – 02 maj: Printempa staĝo en Kvinpetalo. Semajnfina renkontiĝo pri ekologia ĝardenumado kun Bernard Lagrange. [Kvinpetalo](mailto:Kvinpetalo@v.14apr) (v. 14 apr).

30 apr – 03 maj: Rodanalpa Esperanto-Kongreso en Moutiers, Francio. <http://www.rodanalpa.federacio.free.fr>; philippe.pellicier@laposte.net.

majo

01-10: 21-a Aroma Jalto en Ukrainio. [Volodimir Hordijenko, p/k. 35, UA-01133 Kijiv, Ukrainio](mailto:VolodimirHordijenko@p.k.ua). [+3804403172](tel:+3804403172). volodomir@ukr.net.

03-05: La 42-a Tutlanda Esperanto-Seminario en Sendai, Japanio. Kvargrada kursejo. esperanto@jei.or.jp.



07-11: Nacia Interasocia Kongreso de Esperanto en la urbo Troyes en Francio. <http://esperanto10.free.fr>; moonmont@pt.lu. [Daniel Pérard, 18 rue de la Pavée, Le Pavillon Ste Julie, FR-10350, Francio](mailto:DanielPérard@18rue.de.la.Pavée). [+33 03 25766321](tel:+330325766321). <http://esperanto10.free.fr>; esperanto10@free.fr.

16: Jarkunveno de Svisa Esperanto-Societo en La Chaux-de-Fonds, Svisio. [Grosjean Mireille](mailto:GrosjeanMireille@mirejo.mireille@gmail.com), mirejo.mireille@gmail.com.

16 – 18: 6-a MEKARO – Mez-Kanada Renkontiĝo de Esperanto en Toronto, Ontario, Kanado. Turisma amikeca semajnfino. Ne okazas kursoj sed vizitoj kaj komunaj manĝoj. [Toronto Esperanto-Rondo, 6358 rue de Bordeaux, Montréal, Québec, Kanado, H2G 2R8](mailto:TorontoEsperanto-Rondo@6358rue.de.Bordeaux.Montreal.Quebec.Kanado.H2G2R8). informo@esperanto.qc.ca.

20-24: Berlina Arbara Renkontiĝo, Printempa BARo 2009 en Bad Münder inter Hannover kaj Hameln, Germanio. En arbaro, tial ideala por familioj kun etaj infanoj. [Andi Münchow, Oberstraße 15, DE-30167 Hannover, Germanio](mailto:AndiMünchow@oberstraÙe15.de). www.krokodilo.de/baro/baro.php; DL8oap@gmx.net.

22-24: Jarkongreso de la Sveda Esperanto-Federacio en Borlänge, regiono kun bela naturo, kun tuttaga ekskurso al mondfama kuprominejo kaj al subĉiela montara operejo.

☐ Sveda Esperanto-Federacio, Vikingagatan 24, SE-113 42 Stockholm, Svedio. ☎ +46-8-340800. ☐ www.esperanto.se; sefkongr09@esperanto.se.

22-25: 57-a Jarkunveno de Esperanto-USA (antaŭe Esperanto-Ligo de Nord-Ameriko) en Sankta Luiso, Misurio (St. Louis, Missouri). ☐ www.esperanto-usa.org; eusa@esperanto-usa.org; rglossop@mindspring.com.



23-29: 61-a Kongreso de IFEF, Internacia Fervojista Esperanto Federacio, en Triesto, Italio. ☐ Triesta Esperanto-Asocio, C.P. 601 Trieste Centro, IT-34132 Trieste, Italio. ☎ +39 04 0350093; 04 0398562. ☐ <http://ifef.free.fr/spip/spip.php?article49>; www.ifef.net; testudo.ts@gmail.com; noredv@tele2.it.

28 maj – 03 jun: 8-a Eŭropa Esperanto-Kongreso, kaj **86-a Germana Esperanto-Kongreso** dum Pentekosto en ICH/Herzberg. Ĉeftemo: *Esperanto por multkultura Eŭropo*. ☐ ICH, Interkultura Centro Herzberg, Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg/ Harz. ☎ +49(0)55215983. ☐ www.ich-herzberg.de; www.gek-eek.esperanto-urbo.de; esperanto-zentrum@web.de.

31 maj – 01 jun: Postkongreso de la 61-a Kongreso de IFEF en Italio, Triesto. ☐ (v. 23 maj).

junio

05-07: 104-a Skotlanda Kongreso de Esperanto en Dundee, Skotlando, en la bela valo de la rivero Tay. ☐ Andrew Weir, 86 Pond Road, London, E15 3BE Britio. ☐ www.skotlando.org.uk; andrew.w.weir@gmail.com.

06-07: 57-a Kongreso de Esperantistoj en Kansajo, Takatuki, Japanio. ☐ Esperanto-Societo en Takatuki, JP 569-0056 Takatuki-si, Zyonantyo 4-23-23, UKITA-Masaharu, Japanio. ☐ www.geocities.jp/fdtsh088/mokuzi.html; ukitamakal@ybb.ne.jp.

06-07: 58-a Kantoo-Esperanto-Kongreso en Tokio, Japanio. Regiona kongreso de Tokio kaj ĉirkaŭaj gubernioj. ☐ Hori Jasuo, hori-zonto@water.sannet.ne.jp.

09-17: 31-a Ĉebalta Esperantista Printempo kun riĉa kaj varia programo en Mielno, Pollando. ☐ Pola Esperanto-Asocio, Filio en Koszalin, poŝtkodo 30, PL-75-017 Koszalin, Pollando. ☎ +48(0)503417825. ☐ barslavo@wp.pl.

10 – 14: Blue floras la genciano 5 (Amuza junulara semajnfino) en Goldegg. ☐ Inge Simon, Brünner Str. 20, DE-73431 Aalen, Germanio. ☎ +49 7361360615, +49 1704739318. ☐ Inge.Simon@esperanto.de.

13: Renkontiĝo en la regiono de la reĝo Jeĉmínek, kastelo Chropyně, Ĉeĥio. ☐ tonda.krejcir@seznam.cz.

13-17: Trejnseminario Estu aktiva en la Esperanto-movado! en Meksikurbo, Meksiko. Trejnseminario pri E-o-informado, gvidado de grupoj, aranĝi kursojn, retpaĝoj, financoj kaj aliaj sciindaĵoj. ☐ Meksika Esperanto-Federacio; ☐ www.esperanto-mexico.org; mek2009@esperanto-mexico.org.

14: Tago de Esperanto memore al la 90-jariĝo de Japana Esperanto-Instituto/Esperanto-Domo en Tokio, Japanio. ☐ esperanto@jei.or.jp.

19-21: Meksika Esperanto-Kongreso en Meksiko. Interesa programo, ekskursoj (ekz. piramidoj de Teotihuakano), bonaj manĝaĵoj. ☐ mek2009@esperanto-mexico.org.

22-26: 10-a E-kurso en Popola Instituto de Valamo, Heinävesi, Finnlando. Ĉiuj kursoniveloj, kursanoj el la tuta mondo. Post la kursosemajno ekskurso al la monaĥeja insulo Valamo, insulo Ladogo, Rusio. ☐ Esperanto-Asocio de Finnlando, Siltasaarenkatu 15 C 65, FI-00530 Helsinki. ☐ www.esperanto.fi eafsekretario@esperanto.fi.

25-28: 4-a Internacia Meditado-Renkontiĝo de Ŭonbulismo en Iksan, Koreio. ☐ esperanto@saluton.net.

25 jun – 01 jul: FREŜO'2009, Frusomera Renkontiĝo de Esperantistoj Ŝatantaj Olŝtinon en Olsztyn, Pollando. ☐ Elżbieta Frenszkowska, ul. Orłowicza 35 m 5, PL-10-684 Olsztyn, Pollando. ☐ efrenszkowska@wp.pl.

26 – 28: Dua kongreso de serbiaj esperantistoj en Jagodina, Serbio. ☐ Esperanto-Societo "Sreten Adzić", RS-34000 Jagodina, Serbio.

29 jun – 05 jul: 40-a NASK – Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto en San Diego, Kalifornio, Usono, kun Spomenka Štimec, Paul Gubbins kaj Lee Miller. ☐ Ellen M. Eddy, 11736 Scott Creek Drive SW, Olympia WA 98512, USA. ☎ 360-754-4563. ☐ www.esperanto.org/nask; eddyellen@aol.com.

29 jun – 05 jul: Roskilde-Festivalo – grandega rok-festivalo sude de Kopenhago. Dana Esperanta Junulara Organizo aranĝas tie tendaron. Ebla senpaga eniro kaj logado kondiĉe ke vi helpas en la budo de DEJO! ☐ http://dejo.dk/agadejo/roskilde-festivalo/venu-al-roskilde-festivalo_2009/; jacob.nordfalk@gmail.com.

30: Ĉeĥa-germana landlima renkontiĝo inter Dolní Žleb ĉe Děčín (CZ) kaj Schöna ĉe Bad Schandau (DE) inter la 13-a kaj 16-a horoj. ☐ Hans-Joachim Gunkel, HajoGunkel@t-online.de.

julio

01-10: Turismo, kulturo, historio – E-aranĝo en la urbo Carevo ĉe la Nigra maro, Bulgario. Ripozo, sunbanoj, ekskursoj. ☐ Boris Vasilev Gaĝanov, str. "Petar Janev" 21,

BG-4600 Velingrad, Bulgario. ☐ www.elmis.hit.bg.

01-15: Pilgrimado Budapeŝto (Hungario) – Ĉestoĥovo (Pollando), dumvoje meditado: kristana espero. ☐ Julio Rajnai, Szilágyi E. fasor 17. III/3, HU-1024 Budapest, Hungario. ☎ juliorajnai@freemail.hu.

01 jul – 30 sep: Internacia Universitato de Kulturo kaj Pola Lingvo en Universitato de Kazimiro la Granda en Bydgoszcz, kun partopreno en la 18-a Internacia Esperanto-Kongreso en Bydgoszcz, Pollando. ☐ ICKT Bydgoszcz (v. 18 apr).

03-05: Internacia renkontiĝo omaĝe al centa datreveno de la fondiĝo de Esperanto-klubo de doktoro Schulhof kun jarkunveno de AEH-IKEH en Pardubice, Ĉeĥio. ☐ aeh-ikeh@volny.cz.

04-09: Arto-ŝoko en Le Touquet (Francio). Intensa kurso surbaze de la vivo kaj arto de Vincent van Gogh. ☐ Katalin Kováts, Spaarwaterstraat 74. NL-2593 RP, Den Haag, Nederlando. ☐ katalin@ikso.net.



04-11: Staĝo en Grezjono, Francio. Temo: Paco kaj Esperanto. Diversnivelaĵ kursoj kaj prelegoj. ☐ Kulturdomo de Esperanto, Château de Grésillon, FR-49150 Baugé, Francio. ☎ +33-2.41.89.10.34. ☐ <http://gresillon.org/spip.php?rubrique8>; kastelo@gresillon.org.

05-18: Somera Esperanto-Tendaro en Lančov, Ĉeĥio. 1-a etapo de la 57-a Somera Esperanto-Tendaro en Lančov. Kursoj de Esperanto, la angla kaj la germana. ☐ www.set-lancov.cz; info@set-lancov.cz.



07-12: KEF-9 (Kultura Esperanto-Festivalo) – revuo de origina Esperanta kulturo en la ĉarma urbo de Hamlet: Helsingør en Danio. ☐ David-Emil Wickström. ☐ www.kef.saluton.dk; kef9@tejo.org.

08-12: 45-aj Baltaj Esperanto Tagoj en Paikuse (antaŭurbo de Pärnu), Estonio. Tradicia somera renkontiĝo de Baltlandaj esperantistoj kie ĉiuj estas bonvenaj. ☐

Estona Esperanto Asocio, Vana-Tartu mnt 5-5, Vaida EE-75302, Estonio. ✉ esperant@hot.agri.ee aŭ tonu.hirsik@vet.agri.ee.

10-16: Dua Nacia Kongreso de Esperanto en Rumonge, Burundio. ✉ jerrybs21@yahoo.fr.



10-18: SES 2009 – Somera Esperanto-Studado, kun la 2-a lernu!-renkontiĝo. En Modra-Harmónia, Slovakio, nur 30 km de Bratislava kaj 90 km de Vieno. Elstaraj instruistoj, 4-nivelaj kursoj, ILEI-ekzamenoj. Eblas kunvojaĝi al IJK en Liberec. ☎ +421 902203369 (Peter Baláž). ✉ <http://ses.esperanto.sk>, petro@ikso.net.

11: Festivalo pri fiŝista supo en urbo Baja, Hungario. Popolfesto kaj kuir-konkurso – kun esperantista partopreno! ✉ Székely Csaba, ☎ +36 303032386 kaj +36 703336111. ✉ bajai@eposta.hu.

11-18: Staĝo en Grezijono, Francio. Diversnivelaĵ kursoj kaj prelegoj. ✉ Grezijono (v. 04 jul).

12-17: 44-a Brazila Kongreso de Esperanto. Temo: Junularo kaj Esperanto: bazoj por la estotno. ✉ esperantojuizdefora@yahoo.com.br.

12-18: Tiĥvinaj Esperantistaj Metiejoj, TEMO – en vilaĝo Caricino Ozero (Carina Lago), 7 km norde de Tiĥvin, apud Peterburgo, kun eventuala posta komuna vojaĝo al la UK en Bjalistoko. ✉ www.reu.ru; Mihail Bronŝtejn, mamuto@rambler.ru.

16-18: Internacia Junulara Renkonto, KVAK, antaŭkongreso de IJK en la ĉefurbo de muziko kaj distraĵoj, en Vieno. ✉ Aŭstria Esperanto-Junularo, ✉ <http://kvak.esperanto.at/>; gregor.hinker@esperanto.at.



17-25: 42-a Konferenco de ILEI en Krakovo, Pollando. ✉ Małgorzata Komarnicka, ✉ www.esperanto-reto.org/ilei/index.html; margareta.ilei.pollando@gmail.com.

18-24: 18-a Internacia Esperanto-Kongreseto de Esperantotur kun pluaj busekskursoj tra centra kaj norda Pollando, en Bydgoszcz, Pollando. ✉ ICKT Bydgoszcz (v. 18 apr).

18-24: Konferenco de OSIEK en Kondoros, Hungario, 20 km de Békéscsaba. Temo: "Humura literaturo en Esperanto". Prelegos Josef Dörr, Lena Karpunina, David Kelso, Ĵak Le Puil, László I. Tóth kaj aliaj. Paralele funkcios E-kurso por geknaboj. Posttagmeze

ripozo en famaj kuracbanejoj, promenoj tra la kamparo, familiara etoso. Je la fino voĉdonota la OSIEK-premio 2009. ✉ Pál Kozsuch, Vasut u 3, HU-5553 Kondoros, Hungario. ✉ pauljuno@freemail.hu.

18-25: Staĝo en Grezijono, Francio. Diversnivelaĵ kursoj kaj prelegoj. ✉ Grezijono (v. 04 jul).

18-25: 65-a Internacia Junulara Kongreso, IJK en Liberec, Ĉeĥio, kun la temo "Libereco". La urbo Liberec situas 100 km norde de Prago, ĉe la ĉeĥa-germana-pola landlimo. ✉ www.ijk.esperanto.cz; www.tejo.org/ijk; ijk@esperanto.cz.

18-25: 82-a Kongreso de SAT en Milano, Italio. ✉ Andrea Montagner, ✉ www.arciesperanto.it/html/lang/eo/sat-2009/; io@andreamontagner.it.

18-25: 19-a Ekumena Esperanto-Kongreso en Wrocław, Pollando, 62-a kongreso de IKUE kaj 59-a de KELI. ✉ Teresa Pomorska, ul. Świstackiego 9/21, PL 50-430 Wrocław, Pollando. ✉ www.ikue.org/kong2009/index.htm; pomer@wp.pl.

18-25: 82-a Kongreso de SAT en Milano, Italio. Temo: "Elmigri senlandime, vivi sennaciece". ✉ www.arciesperanto.it/html/sat-2009/; andrea.montagner@arciesperanto.it.

18-25: 19-a Ekumena Esperanto-Kongreso en Wrocław, Pollando, 62-a kongreso de IKUE kaj 59-a de KELI. ✉ Teresa Pomorska, ul. Świstackiego 9/21, PL 50-430 Wrocław, Pollando. ✉ www.ikue.org/kong2009/index.htm; pomer@wp.pl.

19 jul – 21 aŭg: Somera Esperanto-Tendaro en Lančov, Ĉeĥio. 2-a etapo de la 57-a Somera Esperanto-Tendaro. Oni instruas Esperanton, la anglan kaj la germanan. ✉ SET (v. 05 jun).



25 jul – 01 aŭg: 94-a Universala Kongreso en Bjalistoko, Pollando. ✉ (v. la kolofono).

25 jul – 01 aŭg: Staĝo en Grezijono, Francio. Diversnivelaĵ kursoj kaj prelegoj. ✉ Grezijono (v. 04 jul).

25 jul-01 aŭg: 40-a Internacia Infana Kongreseto en Junulgastejo "Bukovisko" de la Eduka Centro de Supraŝl, urbeto 16 km de Bjalistoko. ✉ Bert Schumann, 9 rue du Couradin, FR-35510 Cesson-Sévigné, Francio. ✉ <http://bertosch.free.fr/iik2009/index.html>.

aŭgusto

01–05: Postkongresa renkontiĝo en Pollando, "Gdańsk – la urbo de solidareco". ✉ GAK "PLAMA", str. Pilotów 11, PL-80-460 Gdańsk, Pollando. ✉ www.esperantowsopocie.pl/tl/; esperanto.gda@gmail.com.

01–08: Staĝo en Grezijono, Francio. Diversnivelaĵ kursoj kaj prelegoj. ✉ Grezijono (v. 04 jul).

01–16: Festotagoj en N. Tagil, Rusio, Meza Uralo. Renkontiĝo dediĉita al festotagoj de la urbo. ✉ Esperanto-klubo Renaskiĝo, str. Kuŝvinskaja 25, RU-622013 N. Tagil, A, Sverdlovskaja reg., Rusio. ✉ www.kpc2008.narod.ru, klaris8@yandex.ru.

02–08: MIRO, tradicia Internacia Renkontiĝo en Čakovec, Kroatio. ✉ Kroatia Esperanto-Junulara Asocio, KEJA, Kneza Mislava 11, HR 10000 Zagreb, Kroatio. ✉ www.keja.hr/miro_e.html; tina.tisljar@gmail.com; kajulino@gmail.com.

02–15: Somera Esperanto-Tendaro en Lančov, Ĉeĥio. 3-a etapo de la 57-a Somera Esperanto-Tendaro. Kursoj de Esperanto, la angla kaj la germana. ✉ SET (v. 05 jun).

08–15: Staĝo en Grezijono, Francio. Diversnivelaĵ kursoj kaj prelegoj. ✉ Grezijono (v. 04 jul).

08–15: FESTO 2009 en Zwingenberg apud Frankfurto, Germanio. Organizas ĝin JEFO kaj GEJ. ✉ www.promesobanko.com/festo2009.

08–16: Esperanto-tendaro "Milan Zvara" en la vilaĝo Dovhe, Zakarpata provinco, Ukrainio. E-kursoj, piedmarŝoj al montaro, ekskursoj, rakontoj pri la ukraina mitologio, la ukraina lingvo por alilandanoj, fabeloj ĉe fajro apud la pitoreska vilaĝo en turismaj kondiĉoj! ✉ Volodimir Hordijenko, p/k 35, Kijiv, UA-01133, Ukrainio. ✉ <http://orapordego.h.com.ua/milanzvara/>; volodomir@ukr.net.

10–14: Somera Festivalo – Kunludu kaj kunstudu en Barlastono, Britio. Du-nivela kursaro kun la eblo turismi. ✉ EAB (v. 17 apr).

15–22: La 13-aj Internaciaj Esperantaj Renkontiĝoj en Plouezek, Bretonio, Francio. Kursoj por infanoj, adoleskantoj, komencantoj, progresantoj, diversaj atelieroj. ✉ Plouezec Esperanto, 5 Hent Toul Broc'h, FR-22470 Plouezec, Francio. ☎ +33 60698495982, ✉ +49 3068057011. ✉ www.babelo.org; pluezek@gmail.com; roger.eon@tele2.fr.

22–29: 35-a Internacia Semajno de Esperanto en Sète apud Montpellier, sud-Francio. Plurniveloj kursoj, 50m de mediteranea plaĝo, ekskursoj, libroservo, ktp. ✉ Esperanto Kulturo kaj Progreso, 10 passage J.Ferry FR-34290 Servian, Francio, ☎/✉ +33(0)4 67391630. ✉ jf.passarella@free.fr.

22–29: EKOTUR – Tradicia internacia

ekoturisma renkontiĝo por biciklantoj kaj piedturistoj en Svitavy-regiono, Ĉeĥio. ☒ Kava-Pech, Petr Ĉrdle, Anglická 878, CZ-252 29 Dobříčovice, Ĉeĥio. ☎ +420 257712201, ✉ +420 257712126. ✉ chrdle@kava-pech.cz.

28 aŭg – 03 sep: **76-a Itala Esperanto-Kongreso** en Cassino, Italio. ☒ Casini Brunetto, Casella Postale 213, IT-56100 Pisa, Italio. ✉ <http://italakongreso.esperantoitalia.it>; esperanto@edistudio.it.

septembro

04-06: 61-a Kongreso de Bulgara Esperanto-Asocio, en Vraca, Bulgario, kun programeroj okaze de la centjara jubileo de la E-movado en la urbo. ☒ Esperanto, p.k. 26, BG-3000 Vraca, Bulgario. ✉ sukceso@bitex.bg.

13: 8-a Spiritisma Esperanta Renkontiĝo en Brazilio. Ĉeftemo: "150 jaroj de la naskiĝo de Zamenhof". Kun artaj programeroj. ✉ contato@lazaroluizamenhof.com.br.

18-20: Renkontiĝo de Esperantlingvaj Verkistoj en la vilaĝo Hrašćina, Kroatio. La ĉefa gasto estos G. Sutton. ✉ www.esperanto.hr; esperanto@zg.t-com.hr.

21: 12-a Esperanta Renkontiĝo de Taguatinga. Jara unutaga aranĝo kun portugallingva prelego kaj artaj prezentadoj en Esperanto. ✉ esperanto@ig.com.br.

25-27: 5-a Mozellanda Esperanto-Semajnfino en Zell/Mosel, Germanio. Kultura semajnfino de Germana Esperanto-Asocio, landa ligo Rejnlando-Palatinato, kunlabore kun la Luksemburga Esperanto-Asocio. Kun bierseminario kaj vizito al bierfarejo. ☒ Esperanto-RLP kaj LEA. ✉ www.esperanto-rlp.de; wolfgang.bohr@esperanto.de.

oktobro

VERDA KROKODILO

01-04: 9-a KoKoLoRES, 9-a Kafoklaĉo Kaj Ludoj dum Renkontiĝo Semajnfina en Herne, Germanio. Semajnfina aranĝo (ne nur) por ludemuloj, samtempe kurso por komencantoj. ✉ www.krokodilo.de/kokolores/kokolores.php; petra.dueckershoff@esperanto.de.


02-04: Esperanto-filatelato en unuiginta Eŭropo en Herzberg-Esperantourbo. Interŝanĝo de sperto, festo de 50-a jubileo de loka filatelista grupo, aktiva interŝanĝo de objektoj, ekspozicio. ☒ ELF/AREK, Elda Doerfler, Via Ghirlandaio 18/1, IT-34138 Trieste, Italio. ✉ testudo.ts@gmail.com.

03-10: 17-a Internacia Esperanto-Semajno de Kulturo kaj Turismo en Pineda de Mar apud Barcelono, Hispanio. En luksa hotelo, 150m de la strando. E-kursoj, prelegoj, folkloro vespero, ekskursoj. ☒ Luis Serrano Pérez, Apartado 423, ES-08200 Sabadell,

Hispanio. ☎ +34 937275021. ✉ luis_serrano@mixmail.com; <http://personales.ya.com/semajno>.

09-11: Konferenco de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, kun i.a. vizito de Esperanto-muzeo en Svitavy. ☒ Jiří Tomeček, Dr. Bureše 3, CZ-370 05 České Budějovice, Ĉeĥio. ✉ tomecek@esperanto.cz.

10-12: 16-a Aŭtuna renkontiĝo de Esperanto en Silver Bay, Lake George, NY, Usono. Amikeca semajnfino, kursoj, prelegoj, ludoj kaj multe pli. Belega loko ĉe lago. ☒ Esperanto-Societo Kebekia, 6358 rue de Bordeaux, Montréal, Québec, Kanado, H2G 2R8. ✉ informo@esperanto.qc.ca.



10-12: 96-a Japana Esperanto-Kongreso en Kôhu, Yamanashi, Japanio. Temo: Tergloba lingvo de la 21-a jarcento. ☒ S-ro Doi Hirokaz, Japana Esperanto-Instituto, JP-162-0042 Tōkyō-to, Sinzjuku-ku, Waseda-mati 12-3 ☎ +81-3-3203-4581. ✉ <http://members.jcom.home.ne.jp/verda/jek96esp.htm>; jek96k@jei.or.jp.

12-18: InPaSem – Internacia Paroliga Semajno. Kurso por komencantoj kaj seminarioj por jamaj parolantoj en Dobříčovice apud Prago, Ĉeĥio. ☒ KAVA-PECH (v. 22 aŭg).

22-24: 10-a KIES en la komuna juda-araba vilaĝo Neve Šalom, Israelo. Ĉeftemo: "Paco kaj kunekzisto". ✉ Amri Wandel, amri@huji.ac.il.

23-25: Course-You-Can... kaj **ODD** (Semajn-fina esperantlingva diskutrondo) en Barlaston, Britio. Kurso ĉefe por anglalingvaj komencantoj/komencintoj, (spertuloj kunvenigu nespertulojn!) ☒ EAB (v. 17 apr).

25-31: 4-a Kijiva Esperanto-semajno en Kijiv, Ukrainio. Konatiĝo kun la bela kaj glora slava urbo; partopreno en la informkampanjo. ☒ Volodimir Hordijenko, p/k 35, Kijiv, UA-01133, Ukrainio. ✉ volodomir@ukr.net.

novembro

07-14: Terminologia Seminario en Dobříčovice. Kurso pri ĝenerala terminologio kaj ĝia apliko al Esperanto, sub la gvido, krom aliaj, de Jan Werner. Diskuto pri spertoj de la partoprenantoj en kreado de mankantaj terminoj dum verkado de fakaj tekstoj. ☒ KAVA-PECH (v. 22 aŭg).

decembro:

12: AnkRo, Antaŭkristnaska renkontiĝo en Písek, Ĉeĥio. Tradicia renkontiĝo, ĉi-foje omaĝe al la 150-jariĝo de d-ro Zamenhof. ✉ esperanto.pisek@seznam.cz.

INTERNACIA FESTIVALO ... ĵurfine al IF

27 dec – 03 jan: 26-a IF – Internacia Festivalo kun 3-a Internacia Vintra Universitato, en la bavara Nördlingen, Germanio. La plej fama aranĝo por familioj kaj plenkreskuloj. Kadra temo: "Fabeloj". Tuttaga ekskurso al Nürnberg (urbo de la unua E-Grupo). Plilongiga eblo ĝis la 4-a de januaro. ☒ Hans-Dieter Platz (HDP), Postfach 1148, DE-34303 Niedenstein, Germanio. ☎/✉ +49 56248007, ☎ +49 1714964558, ✉ www.internacia-festivalo.de; HDP@internacia-festivalo.de.

2010

majo:

10-14: 91-a Brita Esperanto-Kongreso en Llandudno, Norda Kimrio. ✉ www.esperantollandudno2010.org.uk/.

15-17: 7-a MEKARO – Mez-Kanada Renkontiĝo de Esperanto ĉe Tririveroj, Kebekio, Kanado. Turisma amikeca semajnfino. Okazas vizitoj kaj komunaj manĝoj en restoracioj. ☒ Esperanto-Societo Kebekia (v. 10 okt 2009).

junio

19-23: 6-a Azia Esperanto-Kongreso en Ulanbatoro, Mongolio.

julio

95-a Universala Kongreso en Havano, Kubo.

aŭgusto

20-22: 6-a Nordorienta Ĉina Kongreso de Esperanto en Dandung, Ĉinio.

oktobro:

09-11: 17-a Aŭtuna renkontiĝo de Esperanto en Sylver Bay, Lake George, NY, Usono. Amikeca semajnfino, kun kursoj, prelegoj, ludoj kaj multe pli sur belega loko ĉe lago. ☒ (v. 10 okt 2009).

Mapo de E-aranĝoj troviĝas ĉe:
www.Esperantoland.org

Aktuala listo de konataj E-aranĝoj
daŭre konsulteblas ĉe:
www.eventoj.hu/kalendar

Grava pro malofteco

Postrikolto. Poemoj kaj kantoj tradukitaj. Trad. Kálmán Kalocsay.

Budapest: KAL-ĈI Dokumentaro, 2004. 77p. 21cm. Prezo: € 5,10;

Dissemitaj floroj de Kálmán Kalocsay. Enbukedigita de Ada Csiszár.

Budapest: KAL-ĈI Dokumentaro, 2005. 204p. 21cm. Bind. Prezo: € 30,00

Postrikolto enhavas poemojn kaj kantojn tradukitajn de Kálmán Kalocsay, kiuj ial ne eniris volumojn kiel i.a. *Tutmonda sonoro*. Ni trovas en ĝi poemojn el la literaturoj angla (Auden), ĉina, praegipta, franca (Rimbaud), germana (Rilke), malnovgreka, hispana, hungara (21 p.), itala, islanda, japana, kataluna, kimra, persa, romia kaj vjetnama, kune kun kantoj de Mozart, Schubert, Bizet...

Simile, en *Dissemitaj floroj* atendas onin poemoj ekstervolumaj, aperintaj en *Literatura Mondo*, *Hungara Vivo* kaj aliaj revuoj, el la poezioj angla, ĉina, flandra, franca (krom Aragon ankaŭ *La internacio!*), germana (de Goethe ĝis Wagner), malnovgreka, hungara (91 p.), japana, rusa kaj vjetnama.

Fakte, estas iom strange ke la eroj de *Postrikolto* ne povis atendi unu jaron por fandiĝi kun la *Dissemitaj floroj*; ĉiel ajn, ĉi lastan volumon distingas la fakto, ke ĝi entenas ankaŭ 39 originalajn poemojn de Kalocsay.

Koncerne la tradukojn, temas plejparte pri parnasismaj. Persone mi trovas nenian pravigon por la aldono de rimoj al versoj praegiptaj, oldgrekaj aŭ japanaj; male, mi opinias tian procedon same kondamninda kiel kolorigon (fakte farbadon) de blanknigraj filmoj.

Feliĉe li ŝparis tian sorton al la verkoj de hungaraj poetoj de la 20-a jarcento, kiel la tre interesaj Kosztolányi aŭ Ladányi.

Parenteze, ĉe kelkaj tradukoj jen surprizas la grafika ellaso de apostrofoj, kiel foje ĉe Edwin de Kock aŭ Mao Zifu (tial superfluas la cito de opinio de Brendon Clark, ĉar ĉi tiu fakte kontraŭis la apostrofan eliziadon de vokaloj, ne la presitajn apostrofojn mem). Ankaŭ tian "fidelecon" mi ne ŝatas, kiu pretendas kompensi la rimojn de la originalo per novaj rimoj, ofte inkognite kejlaj, en la esperantigo.

Komparo de la tri sonetoj tradukitaj el la hispana (*Soneto XVII* de Garcilaso de la Vega; *Al rozo* de Góngora; *Faetono*

de Quevedo) kun la originaloj (resp. "*Pensando que el camino iba derecho...*"; *A una rosa: "Ayer naciste y morirás mañana..."*; "*Solar y ejecutoria de tu abuelo...*") igas min sopiri pri senrimaj tradukoj, kiuj redonu la elekton de vortoj, esprimoj kaj bildoj fare de la aŭtoroj. Kial, ekzemple, la tria menciita soneto respektas la rimvorton "Faetones" ("Faetonojn") sed forŝtelas la same mit-ule versfinan

"de Apolo" ("el Apolono"), kiun Kalocsay stompis kaj dampis al "ĉiel-devenon"?

Sed eble rusaj recenzistoj ne konsentas kun mia severa kritiko... Nu, jen la (mal-) virtoj de parnasismo; atendi de ĝi ion alian egalus erpi la maron, aŭ melki bovon senfine.

Inter la 39 poemoj de Kalocsay ni trovas tiujn verkitaĵojn salute por diversaj kongresoj; bele liberversan, kvazaŭ prozan *Ĉu vi sentis?*; elstare japaneskan *Admono*; poemojn militajn kaj postmilitajn, inter ili tiujn laŭdajn al Marx, Engels, Lenin kaj Stalin,


Oktobra odo al la tridekjara Sovjetunio, aŭ la kondamnan *La balado de Franco* (sed kial signi ĝuste nur ĉi tiujn per ikseto? Ĉu por trudi opinion al la legonto?); kaj ankaŭ

poemojn rekte aŭ nur parte esperantismajn, kiel tiujn dediĉitajn al Gaston Waringhien aŭ Marjorie Boulton. Ili ĉiuj espereble iam trovos sian lokon en volumo kun la plena originala poemaro de Kalocsay, frate kun la versoj en i.a. *Mondo kaj koro*, *Rimportretoj*, *Streĉita kordo*, *Sekretaj sonetoj*, *Ezopa saĝo*, *Izolo*, *La dek du noktoj de Satano* kaj *Versojn oni ne aĉetas*.

Dume ni ĝoju, ke ili haveblas almenaŭ en aparta libro, ĉar, kiel skribas Baldur Ragnarsson en *La lingvo serena*, "ne nur la menciita poemaro de Kalocsay [*Streĉita kordo*], aperinta antaŭ pli ol sep jardekoj,

sed ankaŭ lia tuta ampleksa verkaro, originala kaj tradukita, daŭre restas inter la plej gravaj atingoj sur la kampo de la Esperanta literaturo".

Jorge Camacho



Riproĉi per rido la morojn

Castigat ridendo mores.

Jean de Santeul

Eklipsas. Poemaro. Jorge Camacho. Rotterdam: Bero, 2007. 115p. 20cm. Prezo: € 9,90

Difini poeton per unu malelasta kategorio estas praktikado neoportuna, ĉefe se oni provas fermi tiel nuntempan poeton; tio pro la laŭgrada korodiĝo de la literaturaj normoj kiuj nuntempe simple ne plu permesas al la literaturkritiko kategorii homon rekreantan vorte la tutan mondon ĉirkaŭan. En la postparolo al *Celakantoj* Mauro Nervi diras, ke tiu poemaro "pintas mejloŝtone en la realisma tradicio de la Esperanta literaturo", ĉar "la instinkta inspiro estas [...] vivo en sia konkreto — sango kaj polvo, bataloj, ideologio, vojaĝoj, homaj interrilatoj". Baldur Ragnarsson en la postparolo al ĉi-recenzata *Eklipsas* prave atentigas pri multaj variantoj de la realismo kiun la tutmonda literaturo spertis ĝis nun, kaj pro tio li ne emas insisti pri la limoj de tiu konkreta realismo kiu fakte sin trudas ĉe Camacho, kaj preferas malfermi "la pordojn al interpretoj alidimensiaj". En ambaŭ postparoloj oni klare vidas la sinceran praktikadon de la du poetoj trovi ne kategorion sed la taŭgan ŝlosilon por malfermi la pordojn en la poezia palaco de Camacho: Ragnarsson volis, unue, plivastigi la interpreton donitan de Nervi ĝuste ĉar en *Eklipsas* Camacho realismas distiel. Mi mem emas trovi en lia lasta poemaro versojn tre realismajn sed ankaŭ tre ironiajn, jen en la Freŭda senco, do esprimantaj ideojn kiuj malobservantas la tabucenzuron kiu regas en la socio, jen en la Sokrata, do esprimantaj ŝajnan nescion, kaj satirajn, t.e. laŭ la tuta uzo de humoro, ironio, troigado aŭ ridindeco por eksponi aŭ kritiki malvirtojn, miskutimojn aŭ simple la stultecon de la homoj, ĉefe en kunteksto de la nuntempa politiko sed ne nur.

El la poemaro, riĉa pro la temoj, la stilfiguroj kaj la metrikanj eltrovoj, sendube elstaras la poemo *Datreveno*, kies ĉeftemo ne estas la atombombo kiel supraĵa legado inspirus, sed la maldeziro de la homaro ekvidi primaveron. La poeto en tiu ĉi longa poemo starigas al si kaj, nerekte, al ni multajn demandojn kiuj restos senrespondaj, ĉar la celo mem de liaj versoj ne estas doni la veron sed stimuli la aŭtoron mem kaj do la legantojn serĉi kaj esplori, skui la animon kaj la intelekton. Camacho ŝajnas nescii, petas lumojn de fikcia aldialogato — ĉiu el ni: nul respondo fine venos, nur demando animtremige kolektiva:

*Ĉu krom printempon tamen ni esperu
je apenaŭ verŝajna primaver'?*

La leganto spertos plurfoje la sisteman fermon en la poemoj de Camacho (kaj tion bone emfazas Ragnarsson en la postparolo): premiso kaj konkludo kunludantaj en poezia signifocirklaro, la premiso foje estas esperoplena kaj misinforma pri la poemkerno, dum la konkludo revenigas nin al la komenco kaj iel devigas nin relegi la poemon, manke de vibriga deklamado, kiel sugestas Ragnarsson en la postparolo. Kiel legi *Datreveno*? Eblas legi ĝin kiel la plej kortuŝan lirikon de Esperanta poeto kontraŭ la misuzo de novaj scienceltrovoj, kontraŭ ĉia kaj ĉies milito, favore al nova primavero de la popoloj; ĝuste por ĉi-lasto, la poeto konscias pri sia rolo, pro tio li kantas pri la fiagoj, esploras ties kaŭzojn, ties kuntekston historian kaj geopolitikan, ĉar, kiel diras Nervi en la postparolo al *Celakantoj*, "la poezia teksto estas — antaŭ ĉio — konkreta socia realaĵo".

Sendube, iuj legantoj alkitimiĝintaj legi alistilajn poemojn miros trovi tiel abunde la peniktitrojn de Camacho pri rimarkindaj temoj kiel politiko, religio, amo kaj morto, sed tio ne devus mirigi ĉar li eluzas la teknikon satiri pri ĉi tiaj temoj. Sed, unue, kio estas la

satiro? La satiro estas speco de komikeco kiu esprimas juĝon kaj pro tio iuj legantoj povos ne ridi kiam la prisatirita temo estas proksima al ili, tio estas kiam la prisatirito koncernas ilian valorgamon. Lenny Bruce diris ke la realo estas tio kio estas, kaj ne tio kio devus esti; ekzemple, la religiojn koncernas tio kio devus esti, la satiron tio kio estas. Kulture kaj historie (la unua satiristo estis la latina Ennio!) la satiro ekzistas ĉar ĝi respondas al neceso de la homa spirito: la oscilado inter sankti kaj profani. Pro ĉio ĉi kaj el tiuj supre-menciitaj temoj la satiro donas vidpunktojn alternativajn kaj tra la ridado dissemas dubojn, senmaskigas hipokritojn, atakas la antaŭjuĝojn kaj malfermas la diskuton pri memkonvinkoj.

Jen ekzemplo de satiro pri religio:

<i>Je Kristo kredi kondukas al feliĉo. Ja kristanismo</i>	<i>estas la unusola plenvera superstiĉo. (Dia volo)</i>
---	---

Denove la premiso misinformas (sekve: prisatiras) la konkludon, ĉi tie kun tre sprita oksimoro (plenvera superstiĉo) kaj kun verva rimo inda je la anatemoj de la religiuloj (feliĉo-superstiĉo). Cetere, kion diri kiam la poeto kunmiksas esprimojn ligitajn al difinita biblia kunteksto sed en realo li parolas pri la nuntempa mondo?

<i>Limbe, plia provo ripeti la miraklon en Kanao:</i>	<i>ne akvon fari vino sed verŝi sangon. (Kanao)</i>
---	---

Ne pensu tamen ke Camacho poemas por ke vi ridu; li celas la malon, li celas korodstilo kaj moke denunci senpune la falsajn kaj kruelaĵojn okazantajn en la mondo, kaj — sukcese. Kiel tamen la arto povas ekŝanĝi la mondon? Certe malrapide, ĉar ĝi unue parolas al sentemaj personoj, la aliaj ja emas ignori aŭ eĉ cenzuri ĝin, pro tio estas esence grava la satiro: ĝin elmetas libera homo kaj ĝi igas liberaj tiujn kiuj ĝin spertas. Ja tia estas la sento post profunda vojaĝo en la vortmondo de Camacho. Kaj kio estas la libero se ne la vivo spite al la morto? Pro tio estigas samtempe kortuŝon kaj rideton legi en la poemo *Nature* pri arvikolo kiu kortezas arvikolinon en tombejo kaj ke tie ekcipresos kie nun pirolas!

En *Eklipsas* ni spertas veran ĵongliston de la vorto, kiu kapablas kanti lirike la malprimavero de la homaro sed ankaŭ esprimi kaj reprezenti la aspektojn kuriozajn, nekongruajn kaj tamen amuzajn de la realo kiuj estigas ridon aŭ rideton, sen malico, sed kun humana komprenemo kaj simpatio (en la senco: "reciproka favora instinkta inklino de du personoj"). Tre plaĉa ekzemplo estas *Postebrio* kiu pro la titolo memorigas nin pri alia bela ekzemplo pri humursento en nia poezio: *Ebrio* de William Auld. En *Postebrio* Camacho poemas tankae, kaj tiel en multaj lokoj de la poemaro; sed la poeto reformulas la tankaon enhave, ne forme, kaj per malmultaj vortoj tamen imagivaj pensigas nin pri tre malsamaj kulturoj ĉi tie reprezentataj far la drinkaĵoj en, verŝajne, gaja festeto:

<i>Se vi kundrinkos bieron kaj sakeon kaj ruĝan vinon</i>	<i>ne miru ke vi startis enkaŭe lavmaŝinon. (Postebrio)</i>
---	---

Per sia kvara poemaro Camacho rekonfirmas sin en la literatura kampo poezia kie li kapablas patri poemojn modernajn, sed klasikajn t.e. eternajn: leganto je la fino de tiu ĉi dudek-unua jarcento kapablos same kiel ni ĝui la temojn de la poemaro de Camacho. Kaj nuntempaj seriozaj legantoj de beletraĵoj ne bedaŭros alproksimiĝi al tiu ĉi verko tiel prisme nova kaj interesplena.

Nicola Ruggiero

LA SUBAJN TITOLOJN MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bv. atenti ke por varoj sendotaj al adresoj en Eŭropa Unio al ilia neta prezo aldoniĝas aldonvalora imposto: 6% por libroj kaj periodaĵoj kaj 19% por ĉio alia. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj (minimуме 4,00 eŭroj). Antaŭdankon pro via mendo! Gisdata katalogo de haveblaj varoj estas ĉe www.uea.org/katalogo/.

Asocio, La. Skizoj kaj studoj pri la historio de UEA. Ziko van Dijk. Antverpeno: FEL, 2008. 301p. 21cm. ISBN 9789077066379. Kolekto de studaĵoj okupiĝantaj pri, precipe, Biblioteko Hector Hodler, la Statutoj de UEA kaj la Historioj de Esperanto. Aldone, pli leĝeraj kontribuajoj pri diversaj temoj kaj eventoj. € 22,80

Burgo kondamnita, La. Arkadij kaj Boris Strugackij. El la rusa trad. Z. Kačalova, M. Bistрова, D. Vlasova, A. Kirjakov. Moskvo: Impeto, 2009. 351p. 20cm. ISBN 9785716101920. En la Urbo okazas Eksperimento, kiun partoprenas diversepokaj kaj diverslokaj homoj, ĉiu kun sia imago pri la celo de la projekto. € 19,80

Compostelle en famille. Maryvonne Robineau. Fotoj de Bruno Robineau. Nantes: Opéra, 2007. 204+24p. 22cm. Franclingva. ISBN 9782353700288. Franca familio de esperantistoj-vojaĝanoj priskribas sian

pilgrimon al Santiago de Compostela. Verve verkita, bele ilustrita. € 22,20

Fundamento de Esperanto. Itala eldono. L.L. Zamenhof. En la italan trad. L. Fabretto kaj D. Quartironi. Venafro: EVA, 2008. 68p. 20cm. ISBN 9788896028070. Nova traduko de la Fundamento; sen la Universala Vortaro. € 8,10

Granda vortaro Esperanta-kroata / Veliki rječnik esperantsko-hrvatski. Lucija Borčić. Zagreb: Hrvatski savez za esperanto / Sveučilišna knjižara, 2008. 432p. 25cm. Bind. Kromkovrilo. ISBN 9789537015442. Unudirekta vortaro kun preskaŭ 42 000 leksikaj unuoj (kapvortoj + derivaĵoj). € 52,80

Grüner Engel, blaues Land. Dagmar Leupold. München: C.H. Beck, 2007. 204p. 21cm. Bind. Kromkovrilo. ISBN 9783406556173. Germanlingva romano en kiu Esperanto kaj la neŭtrala Moresnet ludas gravan rolon. € 18,00

Ilustrita enciklopedio de hejmaj mamuloj. Kompilis Nikolao Guĉskov. Moskvo: Impeto, 2008. 240p. 20cm. Ilus. ISBN 9785716101913. Utilaj informoj pri dekoj kaj dekoj da besto(specio)j; indeksoj en la lingvoj:

Esperanto, latina, angla, franca, germana kaj rusa. € 18,90

Infana raso, La. Poemo en 25 ĉapitroj. William Auld. Chapecó: Finto, 2008 (4a eld.). 100p. 21cm. Ilus. Ĉefverko de la E-poezio. € 9,90

Interkultura dialogo kaj komunikado. Referaĵkolekto de eŭropa konferenco, Maribor, 29-31.07.2007. Div. Red. Maja Tišljar. Bruselo: EEU, 2008. 95p. 30cm. La tekstoj de 10 referaĵoj, en Esperanto kaj la denaska lingvo de la prezentinto. Prezentoj en Esperanto kaj la germana. € 9,90

Istorija esperanta. Aleksandar Korženkov. El Esperanto trad. P. Marinović k.a. Beograd: Esperantsko društvo "Radomir Klajić", 2009. 166p. 21cm. Serblingva. ISBN 9788690509751. Ĉapitroj el la historio de Esperanto, preparitaj kiel tekstoj por Esperantaj kursoj kaj seminarioj (1998-2004). € 12,30

Japana esperantologio 3/2008. Bulteno de Japana Esperanto-Instituto. Div. Tōkyō-to: JEI, 2008. 133p. 26cm. Du-lingva (E, japana). ISSN 09185895. Tekstoj de prelegoj prezentitaj dum la 92a UK en Jokohamo. € 13,50




Plansprachliche Bibliotheken und Archive. Red. Detlev Blanke. Berlin: Gesellschaft für Interlinguistik, 2008. 157p. 30cm. Germanlingva. ISSN 14323567. Dek du kontribuajoj al la jara kunveno de la Asocio por Interlingvistiko, 23-25 novembro 2007. € 13,80

Senfrokiĝinto. Ŝarlerik d'Arroi. Thaumiers: LKK, 2008. 19p. 30cm. Suplemento al *La Kancerkliniko*. ISSN 03985822. Framasono grumbas pri la aktuala framasonismo kaj pledas por ĝia modernigo. € 4,80

Sonĝo pri amo kaj morto. Filip David. El la serba trad. A. Eremija. Beogrado: Interpress, 2009. 175p. 21cm. ISBN 9788675610779. "Mallonga romano pri amo, mallonga romano pri mortado". € 7,50

Vero kaj scienco. Antaŭludo de filozofio de libereco. Rudolf Steiner. El la germana trad. W. Nüesch. Berno: La tradukinto, 2009. 62p. 21cm. Malkiel



Kant, la aŭtoro asertas "ke por nia pensado estas atingebla ĉio, kio estas alportenda por klarigo kaj sondado de la mondo". € 3,90

Wakayama to esperanto. Red. Egawa Harukuni, Hukumoto Hirotugo, Doi Tiekō. Tōkyō-to: JEI, 2008. 63p. 21cm. Ilus. ISBN 9784888870573. Konciza historio de la

E-movado en la japana gubernio Wakayama. € 5,70

NELIBROJ

Fek al Esperanto. La pafklik. Donneville: Vinilkosmo, 2009. Kun tekstobroŝuro. Preskaŭ dudeko da pecoj ampleksantaj pli ol 50 minutojn de moderna muziko; certe kelkaj tekstoj

ofendos ĝisostulojn kaj prudulojn. KD. € 17,40

Kroatio: Koverta "Centjariĝo de Esperanto en Kroatio". Zagreb., 2008. Eldonita kaj porokaze stampita la 13-an de decembro 2008. € 2,10

Nun mi pripensos. Claudio Procopio. El la itala trad. M.

Lipari kaj N. Vessella. Corsico: Fioriverdi, 2008. Lingva kartludo por 2 ĝis 17 ludantoj. € 9,00

Verkaro kaj tradukaro. A. Kerbel. Hajfa: La aŭtoro, 2009. Preskaŭ ĉio kion la aŭtoro verkis aŭ tradukis (lernolibro, kantaro, prozaj tradukaĵoj k.a.) en formato PDF. Komputila KD. € 15,00

Libroservo de UEA en 2008: Lernintoj de Kolker iris al ekzameno

En 2008 la jara furorlisto de la Libroservo de UEA ricevis alian ĉampionon ol *Vojaĝo en Esperanto-lando* de Boris Kolker, kiu retenis la unuan lokon admirinde longe, ses jarojn.

La plej vendata titolo estis la gvidilo por *Internaciaj Ekzamenoj de ILEI/UEA*, kies reviziita eldono surmerkatigis en la 93-a UK. Kvazaŭ logika paŝo: post lernolibro al ekzameno. Ĉar dum kvin jaroj la gvidilo ne estis aĉetebla, akumuliĝis tia bezono, ke nur kvin monatoj sufiĉis, por ke ĝi furoru super ĉiuj aliaj. Preskaŭ duono de ĉiuj ĝiaj vendoj okazis jam en la UK, montrante, kiom bezonata la kajero estis.

Ĉar la Libroservo de UEA estas la plej granda en Esperantujo kaj kiel pogrando kaj kiel detalisto, ni tradicie aperigas du furorlistojn. La unua montras la totalajn vendojn de la koncernaj titoloj; tiu de unuopaj vendoj inkluzivas nur unuekzemplerajn aĉetojn. Al la unua ĉefe influas aliaj libroservoj, kiuj mendas saman titolon grandkvante, kaj al la dua individuaj klientoj, kiuj kutime mendas po unu ekzempleron. La kongresa libroservo estas traktata, kvazaŭ ĝi estus unu granda ekstera kliento. Tial ankaŭ la ekzamengvidilo ne staras unuvaloke inter la unuopaj vendoj, kvankam ĝiaj vendoj dum la UK fakte estis unuopaj aĉetoj de kongresanoj. La preferojn de la kongresaj klientoj montras aparta furorlisto (vd. tiun de la Roterdama UK en la novembra numero, p.232).

UEA mem estis la plej populara eldonisto. En la listo de ĉiuj vendoj 13 titoloj el 20 estas eldonaĵoj de UEA/TEJO kaj en tiu de unuopaj vendoj 9. La pozicio de UEA eĉ plifortiĝis, ĉar en 2007 la nombroj estis resp. 11 kaj 8. Indas ankaŭ atenti pri unu komuna trajto de praktike ĉiuj furoraĵoj, kiom ajn variaj ili estas laŭ kategorio: temas pri bone prizorgitaj presaĵoj, ofte ankaŭ grafike allogaj. Estas tute en ordo delogi klientojn per la ekstera aspekto; ĉiu eldonisto ja devas celi, ke la varo estu plejble multnombro vendita. Krom pri enhavo kaj lingvaĵo, UEA mem aparte zorgas ankaŭ pri la fizionomio de siaj eldonaĵoj, sed ĉar temas pri UEA, ĝi faras tion ne nur por bone vendi sed ankaŭ por montri ekzemplon, kiun aliaj imitu.

La vendoj sumiĝis je 125 125 eŭroj (122 420 en 2007). Al la rezulto ĉiam influas la vendoj dum la UK. Kvankam en 2008 ĝi estis iom malpli multnombra ol en 2007, en Roterdamo la kongresanoj aĉetis por triono pli ol en Jokohamo, nome por 40 504 anstataŭ 31 042 eŭroj. Estis venditaj entute 13 707 ekz. de 2554 malsamaj titoloj de libroj kaj diskoj, se ne enkalkuli insignojn, glumarkojn k.a. "diversaĵojn". La butikoj en la CO servis entute 662 klientojn, kiuj aĉetis poŝte aŭ surloke almenaŭ unufoje dum la jaro. Tio ne inkluzivas la klientojn en la kongresejo, kiuj ne estis aparte nombritaj.

Osmo Buller

VENDOJ ENTUTE

ekz. titolo	prezo (€)
349 <i>Internaciaj Ekzamenoj de ILEI/UEA*</i>	4,50
284 <i>Pasporta Servo</i> , listo de gastigantoj*	15,00
229 <i>Vojaĝo en Esperanto lando</i> , Boris Kolker*	18,00
214 <i>Utila Estas Aliĝo</i> , Ulrich Lins*	15,00
186 <i>Poŝamiko</i> , B. Allée & K. Kováts	5,10
181 <i>Gerda malaperis!</i> , Claude Piron	6,60
170 <i>Tuj apude</i> , Humphrey Tonkin*	7,50
145 <i>La Komuna Eŭropa Referenckadro</i> , Div.*	3,00
107 <i>Saluton!</i> , A. Childs-Mee*	10,80
106 <i>Ksenofobia gvidlibro al la nederlandanoj</i> , R. Bolt/S. Davies	6,00
93 <i>Vivo de Zamenhof</i> , Edmond Privat*	9,00
91 <i>Initiation théorique et pratique à la langue internationale Esperanto</i> , P. Denoel	6,00
89 <i>Bona Espero</i> , Roman Dobrzyński	15,00
85 <i>La Trezoro</i> , H.M. Al-Amily*	15,00
81 <i>Naturaj vortordoj en Esperanto</i> , Wim Jansen*	4,50
69 <i>Vikipedio — praktika manlibro</i> , Red. Y. Nevelsteen	3,00
66 <i>Manlibro pri olimpikaj vortoj</i>	12,00
65 <i>Faktoj kaj fantazioj</i> , Marjorie Boulton*	13,80
65 <i>Lingvo kaj popolo</i> , Humphrey Tonkin* elĉ.	
64 <i>Internacia Kongresa Universitato 2008</i> , Red. J.A. Vergara*	15,00

VENDOJ UNUPAJ

ekz. titolo	prezo (€)
67 <i>Pasporta Servo</i> , listo de gastigantoj*	15,00
42 <i>Ksenofobia gvidlibro al la nederlandanoj</i> , R. Bolt/S. Davies	6,00
35 <i>Beletra Almanako 2</i> , Div.	9,90
30 <i>Utila Estas Aliĝo</i> , Ulrich Lins*	15,00
28 <i>Dio, psiĉo kaj mi</i> , Claude Piron	15,00
28 <i>La Trezoro</i> , H.M. Al-Amily*	15,00
27 <i>Beletra Almanako 3</i> , Div.	9,90
22 <i>Concise Encyclopedia of the Original Literature of Esperanto</i> , G. Sutton	45,00
21 <i>Esperanto via de directe methode</i> , S. Marček	7,50
21 <i>Plena ilustrita vortaro de Esperanto 2005</i>	87,00
20 <i>Komuna Eŭropa Referenckadro por lingvoj</i> , Div.*	27,00
19 <i>Internaciaj Ekzamenoj de ILEI/UEA*</i>	4,50
19 <i>Initiation théorique et pratique à la langue internationale Esperanto</i> , P. Denoel	6,00
18 <i>Naturaj vortordoj en Esperanto</i> , Wim Jansen*	4,50
17 <i>Vivo de Zamenhof</i> , Edmond Privat*	9,00
16 <i>Rusoj loĝas en Rusujo</i> , Red. Anna Löwenstein	10,50
16 <i>La Edda</i> , S. Sturluson/B. Ragnarsson	15,00
16 <i>Pri vagabondoj kaj friponoj, pri damoj kaj kavaliroj</i> , L. Couperus/G. Berveling*	9,90
16 <i>Vikipedio por vi</i> , Ziko van Dijk	4,50
16 <i>La Alkemisto</i> , P. Coelho/C. Valle	16,80
16 <i>Tuj apude</i> , Humphrey Tonkin*	7,50
16 <i>Beletra Almanako 1</i> , Div.	9,90

*Eldonaĵoj de UEA/TEJO

DUMVIVAJ MEMBROJ

Belgio: M. Van Damme.

PATRONOJ DE TEJO

Argentino: R. G. Calógero. Aŭstralio: J. Bishop. Belgio: G. Maertens, A. J. Mechelynck, J. Pinto de Sousa. Britio: M. H. McClelland. Danio: S. D. Hazard. Finnlando: K. Hautamäki, A. Karkiainen, A. Kytä, M. Laamanen, S. Mynttinen, R. Pyhälä, P. Saarinen. Germanio: G. Macioszek, R. Makabe, F. Reisel, J. Zimmermaan. Hungario: F. Szabó-Felső. Israelo: J. Tilleman. Japanio: H. Fukumoto, K. Hosomi, K. Kai, U. Kobayasi, S. Simada. Nederlando: L. Demmendaal, D. ten Haaf, K. Marciniak, M. Massar-van Diepen, F. J. Pieterse-Kruger. Norvegio: D. Draper. Pollando: M. Dobrzyński. Usono: P. Link.

SOCIETO ZAMENHOF

Argentino: R. Calógero. Aŭstralio: J. Bishop. Aŭstrio: S. Stamm. Belgio: G. Maertens, J. Pinto de Sousa, K. Tytgat. Britio: G. Sutton, J. Wells. Danio: T. Bak, A. Birkbak, A. Casper-Mortensen, T. Gregers, E. Hjorth, E. Mortensen, B. Nielsen, B. Trærup. Finnlando: A. Harju, A.-L. Heikkinen, S. Mynttinen, V. Tikkanen. Francio: A. Albault, S. Amariglio, A. Andrieu, R. Boré, H. Gauducheau, S. & H. Lafargue, D. & A. Loisel, C. Longue-Épée, L. & J. Marin, O. Masseron. Germanio: E. Blasius, E. Bork, W. Bormann, H. Erhard, H. Klünder, Gisela & Georg Macioszek, R. Makabe, H. Muhsal, A. Putze, M. Scherm, I. Tautorat, C. Trésorier. Hispanio: L. Hernández García, R. Urueña de Hernández. Israelo: J. Šemer. Italio: M. Lipari. Japanio: K. Deguti, H. Fukumoto, K. Hosomi, Y. Itou, K. Kikusima, Y. Kuroyanagi, S. Kuzume, A. Morita, G. Pompilio, N. Sakurai, S. Simada, K. Simizu, K. & N. Syôzi, S. Yamasaki. Kanado: B. Crisp, S. Norvell Jr. Kroatio: B. Čović. Litovio: P. Jegorovas. Luksemburgio: C. Nourmont, B. Moon. Nederlando: G.A.M. van Bergeijk, L. Demmendaal, D. ten Haaf, M. v/d Horst-Kolińska, E. C. Klaver, M. Massar-van Diepen, J. Moonen, N. Overwater, G. Peet. Norvegio: D. Draper, T. Jansson. Peruo: M.-L. Vanherk. Svedio: S. Fritz, H. Lindros, M. Häggström, L. Holmlund. Tajlando: D. Cohen, K. Kawakami. Usono: U. Becker, G. Grady, J. Edwards, R. Jaderstrom, L. & W. Harmon, B.A. Sherwood, D. Simpson, R. Swenson, H. Tonkin, A. Victor.

DONACOJ

Ĝis la 15-a de februaro

Ĝenerala kapitalo: Usono: M.L. Barkley (heredaĵo) 73 329,78. *Sumo ĉi-jara*: 73 329,78.

Konto Afriko: Brazilo: J.M. Marques 4,76. Britio: J. Bunting 112,36; G. Sutton 101,07. Germanio: J. Hamman 7,23. Hispanio: R. Urueña 200,00. Nederlando: C. & R. Bossong, F.J. Pieterse-Kruger – po 50,00. Svedio: J. Hammarberg 27,92. *Sumo ĉi-jara*: 553,34.

Fondajo Ameriko: Koreio: So Gilsu 76,89. Nov-Kaledonio: L.M. Berthelin 50,00. Usono: A. Bennet 30,76; P. Browne 15,38; E. Eddy 60,75; G. Grady 7,69. Div. malgrandaj: 3,84. *Sumo ĉi-jara*: 245,31.

Fondajo Azio: Japanio: M. Hirotaka, T. Isikawa, E. Kimura, A. Matubara, T. Matumoto, S. Miyamoto, A. Nisinaga, T. Nisio, Y. Sasaki, M. Tahira, K. Tanaka, Y. Tanaka, H. Yamaguti, S. Yamamoto, S. Yamasaki, Y. Yazaki – po 16,10; S. Nagura 24,15; Ĉ. Doi, E-Rondo de Gunma – po 80,54. *Sumo ĉi-jara*: 442,83.

Konto Novjorka Oficejo: Hispanio: R. Urueña 150,00; L. Hernández 100,00. Usono: G. Grady 7,69; H. Tonkin 61,51. Div. malgrandaj: 1,92. *Sumo ĉi-jara*: 321,12.

Fondajo Canuto: Brazilo: Anonima 720,00. Britio: G. Sutton 101,07. Danio: Anonima 100,00. Germanio: A. Engroff 10,00. Israelo: J. Tilleman 20,00. Nederlando: L. Demmendaal 100,00; R. Moerbeek 50,00; F.J. Pieterse-Kruger 50,00. Svedio: Norrköpings E-klub 155,06. *Sumo ĉi-jara*: 1 306,13.

Konto Espero: Hispanio: L. Hernández, R. Urueña – po 100,00. *Sumo ĉi-jara*: 200,00.

Triamonda Kongresa Fondajo: Finnlando: A. Ali-Simola 13,00. Nov-Kaledonio: L.M. Berthelin 60,00. Svislando: Anonima 500,00. *Sumo ĉi-jara*: 573,00.

Volontula Fondajo: Nederlando: F. Kat 250,00; F.J. Pieterse-Kruger 50,00. *Sumo ĉi-jara*: 300,00.

Ĝenerala kaso: Germanio: H. Erhard 32,00. Nederlando: J.M. Niemans-van Beek 41,00. Usono: G. Grady, R. Skutt – po 7,69. Div. malgrandaj: 4,59. *Sumo ĉi-jara*: 92,97.

Al ĉiuj koran dankon! UEA

VIZITU VIAN PROPAN DOMON ĈE NIEUWE BINNENWEG 176 EN ROTTERDAMO DUM

MALFERMA TAGO

sabaton la 25-an de aprilo 2009 (10h00 - 17h00)

- ★ En la libroservo ĉio rabatita je 10%
- ★ Specialaj ofertoj
- ★ Bazaro de esperantaĵoj
- ★ Senpaga loterio
- ★ Kafo kaj teo senpage servataj

Speciala gasto:
ANNA LÖWENSTEIN



Solena disdonado de diplomoj en Ĉinio

La 26-an de novembro okazis solena disdonado de diplomoj al la gelernantoj de la kurso de Esperanto, okazinta en la Altlernejo pri Porprofesiaj kaj Teknikaj Studoj de la ĉina urbo Foshan, proksime de Kantono.



Kvindeko da gelernantoj kaj kelkaj profesoroj, kiuj aktive kaj entuziasme partoprenis la kurson, ricevis la diplomon "Parto A". Ĉiuj esprimis sian deziron daŭrigi la lernadon de la lingvo, kio okazos ekde marto ĝis junio 2009.

Dum la instruado oni uzis ĉiujn pedagogiajn kaj teknikajn rimedojn. La altlernejo estas bone ekipita: ne mankas komputiloj, projekciiloj, granda ekrano ktp. Dum la kurso oni kontaktis pere de la reto esperantistojn el aliaj landoj (ekz. Pollando, Francio, Ukrainio), korespondis kaj babilis kun alilandaj samideanoj.

Por la daŭrigo de la kurso, "Parto B", oni anoncas pli amasan partoprenon. Multaj lernantoj de la hispana lingvo enviis siajn kolegojn, kaj volas baldaŭ aliĝi al la kurso de Esperanto.

Kvankam oni ĉiam propagandas ke pere de nia lingvo oni povas koni aliajn landojn kaj kulturojn kaj havi amikojn en la tuta mondo, tio rilate ĉinojn estas nur duonvero. Ege malfacilas por ili havi la eblon vojaĝi al aliaj landoj. Ni havu la esperon ke Esperanto helpas detrui ne nur la lingvajn, sed ankaŭ la landlimajn barojn.

Augusto Casquero

Esperanto en du ĉeĥaj fakultatoj

La studobjekton "Esperanto 1" finis en la antaŭkristnaska semajno 12 studentoj de la Naturscienca fakultato de la Universitato Palacký en Olomouc, kaj 42 studentoj de la Pedagogia fakultato de la Universitato Masaryk en Brno, ambaŭ en Moravio, orienta parto de Ĉeĥio.

Sur la foto videblas la studentoj en Brno, kiuj dum la studkontrolo solvas la interagan teston "Mia amiko lernas" el edukado.net de Katalin Kováts.

Krom la testo ili havis la taskon rakonti laŭ siaj notoj pri vidindaĵoj kaj memorindaĵoj de sia loĝloko kaj ĝia ĉirkaŭaĵo, eventuale roli kiel ĉiĉerono de sia eksterlanda gasto.

Por la studobjekto "Esperanto 2" en la sekva, printempa semestro, aliĝis ĝis nun en Brno 12 studentoj. En Olomouc la nombro ankoraŭ ne estas konata, ĉar temas pri elektebla

studobjekto, kaj la aliĝo de la studentoj dependas ne nur de ilia emo, sed ankaŭ de tio, ĉu ili samtempe ne havas alian devigan studobjekton, kiun ili ne rajtas ne partopreni.

Kelkaj el la studentoj jam kontaktis Ĉeĥan E-Junularon (ĈEJ) kaj planas partopreni en la Internacia Junulara Kongreso en Liberec. Unu studento eĉ partoprenos en la Bjalistoka UK.

Josef Vojáček



La nova UEA-ekzameno sukcese premieris

Post kelkara laboro, je la jarŝanĝo debutis la nova Esperanto-ekzameno, kiu estas konforma al la normoj de la Komuna Eŭropa Referenckadro (KER) kaj ofertas egalrangan mezuradon de la kvar bazaj lingvaj kapabloj en la niveloj B1, B2 kaj C1.

Partoprenantoj de la Internacia Festivalo (IF) en Düsseldorf havis la bonŝancon esti la unuaj por trapasi tiun internacie rekonatan ekzamenon. Sume 8 personoj el 6 landoj uzis la eblon: 3 el ili elektis la nivelon B2 (forta meznivelo postulanta fluan parolkapablon, bonstilan memstaran verkadon, komprenkapablon de tekstoj el la ĉiutaga vivo) kaj 5 kandidatoj aliĝis al la pli supera nivelo C1.

Laŭ la regularo kontraktita kun la Ŝtata Lingvoekzamena Centro (ITK) en Budapeŝto, Hungario, la skribaj taskoj (farendaj en 180 minutoj en B2 kaj en 240 minutoj en C1) estos korektataj tie fare de spertaj fakuloj, kiuj prizorgas la akredititajn samnivelajn ekzamenojn aprobitajn ankaŭ de la Asocio de Lingvotestistoj en Eŭropo (ALTE). La surlokajn buŝajn ekzamenojn en Düsseldorf gvidis Renato Corsetti kaj Zsófia Kóródy, ambaŭ trejnitaj ekzamenantoj laŭ la KER-postuloj. UEA kore gratulas la unuajn ekzamenitojn, kiuj bonege sukcesis en la buŝa parto.



La ekzamena komisiono (de dekstre): Zsófia Kóródy, Renato Corsetti kaj la helpanto Sándor Hideg. Foto: Paulo Branco.

Estas ĝojige, ke tiom multaj ekzameniĝontoj anoncis sin malgraŭ la jarfina festo kaj la mallonga tempo, kiu restis post la fina decido okazigi la ekzamenojn ankoraŭ en 2008.

Ekde nun eblos regule organizi tiujn normigitajn UEA-ekzamenojn en grandaj internaciaj renkontiĝoj aŭ aliloke, kie estos grupo de kandidatoj por almenaŭ unu el la tri niveloj. Por 2009 estas jam planataj ekzamensesioj dum la Printempa Semajno Internacia (PSI) en St. Andreasberg, Germanio, inter 10-17 aprilo; dum la Malferma Tago en la Centra Oficejo de UEA (Roterdamo, Nederlando) en aprilo; kaj dum la 94-a UK en Bjaltoko (Pollando) en julio. Pli detalaj informoj pri la ekzamenoj troviĝas en: www.edukado.net/pagina/NOVAJ+UEA-EKZAMENOJ/22422/.

La Nord-Amerika Somera Kursaro (NASK)

- ◆ bela marborda situo, en mondfama universitato
- ◆ trisemajna intensa lernado de Esperanto
- ◆ tri niveloj: postbaza, meza, supera
- ◆ internaciaj instruistaro kaj studentaro
- ◆ riĉaj vesperaj kaj semajnfinaj programoj

Datoj: 29 junio - 17 julio 2009.

Loko: Universitato de Kalifornio, San Diego (UCSD).

Instruistoj: Spomenka Štimec (Kroatio), Paul Gubbins (Britio) kaj Lee Miller (Usono). **Direktoro:** Grant Goodall.

NASK okazos tria-foje en sud-Kalifornio. La instruistoj pretigas trinivelan studprogramon kiu emfazos la aktivan uzadon de Esperanto kaj enprofundiĝon en la Esperantan kulturon. Oni povas perfektigi sian Esperanton kaj uzi ĝin tuj dum la UK 2009.



Apartaj 40-datrevenaj aktivecoj. Speciala kotizo por studentoj kaj instruistoj! Stipendioj haveblas.

Trovu pli da informoj en <http://esperanto.org/nask>, aŭ skribu al la kunordiganto: Ellen M. Eddy, 11736 Scott Creek Drive SW, Olympia WA 98512 USONO. ☎ (+1) (360) 754-4563; ✉ eddyellen@aol.com.



Forrest J. Ackerman (1916-2008) mortis la 4-an de decembro en Los-Anĝeleso. Li havis enorman kolekton, la plej grandan en la mondo, de libroj, afiŝoj, maskoj k.a. objektoj rilataj al scienc-fikcio kaj horofilmoj, pri kiuj li estis eminenta fakulo. En 1954 li lanĉis la anglan esprimon Sci-Fi kaj en 1958 fondis la renoman revuon *Famous Monsters of Filmland*. Li esperantistiĝis en sia junaĝo, aliĝis al UEA en 1955 kaj estis longe fakdelegito pri scienc-fikcio. En la unua monda kongreso pri scienc-fikcio en 1939 li faris paroladon en Esperanto, vestita en futurisma kostumo.

Bak Gang (1920-2008), konsilanto de Korea E-Asocio kaj esperantisto ekde 1937, forpasis la 20-an de aprilo en Gimhae.

Fernand Boyet (1921-2008), em. scienc-inspektoro kaj fakdelegito pri la instruado de scienco, mortis la 15-an de decembro en Angers (Francio). Li aliĝis al UEA en 1949 kaj estis dumviva membro ekde 1969.

Giorgio Bronzetti (1931-2009) forpasis la 14-an de januaro en Chieti (Italio), kie li estis delegito kaj fakdelegito pri informado kaj lingvodefendo. En 1955 li organizis la 11-an IJK en L'Aquila. Direktoro de la gazetara agentejo "Disvastigo", li ĉefe aktivis pri Esperanto-informado.

Pierrette Chatelus (? – 2008), dumviva membro de UEA, mortis en Lyon (Francio).

Odette Fregonara (1922-2008) forpasis la 14-an de novembro en Genevo, kie ŝi estis delegito 1976-2006.

Vuokko Heinäsuo (1914-2008), honora membro de E-Asocio de Finnlando kaj multjara membro de Societo Zamenhof, mortis la 16-an de aŭgusto en Helsinko. Ŝi longe prizorgis la "Propran Ejon" de EAF.

Marguerite Jaccard-Besson (1914-2008)

mortis la 24-an de novembro en Rolle (Svislando). Ŝi lernis Esperanton pli ol 80-jara kaj partoprenis plurajn UK-ojn. Pri ŝia partopreno en la Pekina UK raportas la filmo *Lekanto al Pekino* de Nandir (2004).

Kang Bong-Gil (1929-2008), konsilanto de Korea E-Asocio kaj iama fakdelegito pri tradukado, mortis la 9-an de oktobro en Seulo.

Lee Jong-Hyun (1938-2008), konsilanto de Korea E-Asocio, mortis la 19-an de oktobro en Busan, nur tri monatojn post la forpaso de sia pli aĝa frato Lee Chong-Yeong. Li prezidis la filion Busan-Gyeongnam de KEA 1997-2001 kaj fondis Busanan E-Centron en 1998. Li adoptis Esperanton kiel lernobjekton en la Jisan-lernejo pri Flego kaj Sano, fondita de li mem. Ĉiujare ĉ. 300 studentoj lernis la lingvon. Li estris LKK de la Korea E-Kongreso en Busan en 2000.



Ralph A. Lewin (1921-2008) forpasis la 30-an de novembro. Filo de la brita veterano Maurice Lewin, ekde 1950 li vivis en Usono. Li fariĝis aŭtoritata fakulo en la kampo de mara biologio; oni nomis lin "la patro de la genetiko de verdaj alĝoj". Inter liaj sciencaj sukcesoj estis prilaboro de metodoj por la studo de ĉelaj mutaciintaj. Li verkis preskaŭ 300 sciencajn artikolojn kaj redaktis plurajn librojn. En 1994 aperis lia angla-Esperanta-ĉina *Internacia vortaro de mikroba genetiko*. Plurfoje li prelegis en la Internacia Somera/Kongresa Universitato. Lewin havis ankaŭ poezian talenton, aperigante anglalingve kvar volumojn de humuraj poemoj. Li poluris la tradukon de la infanlibra klasikaĵo *Winnie-la-Pu* de A.A. Milne faritan de Ivy I. Kellermann Reed, kiu aperis redaktita de H. Tonkin (1972; 2-a eld. 1992). Ankoraŭ ne eldonita estas ĝia daŭrigo *La Domo ĉe Pu-angulo*, kiun li tradukis kun Maire Mullarney. En lia traduko aperis ankaŭ la rakonto *La 13 horloĝoj* de "la plej bona usona humuristo"

James Thurber (1993). Lewin estis dumviva membro de UEA kaj ekde 1956 delegito kaj fakdelegito pri biologio, mikrobiologio kaj botaniko.



Raif Markarian (1930-2008) forpasis la 16-an de novembro en Sheringham (Britio). Profesia lingvoinstruisto, li multe kontribuis al la instruado de Esperanto. Li estis sekretario (1962-1975) kaj honora prezidanto de la Societo de Britaj Instruistoj de Esperanto. Rezulte de liaj esploroj pri la propedeŭtika utilo de Esperanto aperis la CED-broŝuro *La eduka valoro de la instruado de Esperanto en la lernejoj* (1964). Li aŭtoris la lernolibrojn *Ni parolu Esperanton* (1971) kaj, kun J.H. Sullivan, *Secondary School Esperanto* (2 vol.; 1968, 1979), kiuj "plu restas nesuperitaj kiel lernmaterialoj por anglalingvaj adoleskaj lernantoj de Esperanto" (J. Wells). Li estis dumviva membro de UEA kaj fakdelegito pri skoltismo, UN-aferoj kaj kristana scienco. Ambaŭ liaj filinoj, Joy kaj Nikola, fariĝis denaskaj esperantistoj.

Ermanno Mello (1942-2009) mortis la 30-an de decembro en Bienni (Italio), gvidanto de sia propra Agita Centro kontraŭ Kultura Agreso kaj Lingv-imperismo.

Kurt Niederbröcker (1927-2008) mortis en septembro en Bünde (Germanio), kie dum kvaronjarcento li estis delegito kaj fakdelegito pri stenografio.

Jane Sloan (1923-2009) forpasis la 1-an de januaro en Summerland (Brita Kolumbio, Kanado). Ŝi estis renoma fotografisto, kies fotoj aperis i.a. en *Time* kaj *Life*. Ŝi estis membro de LKK de la Vankuvera UK en 1984.

Délio Pereira de Souza (1918-2009) forpasis la 2-an de januaro en Rio-de-Janeiro. En 1942 li estis kunfondinto de la urba Asocio E-ista de Rio-de-Janeiro, kiu en 1992 iĝis ŝtata organizaĵo. En 1975 li kunfondis Spiritan Eldonan Societon F.V. Lorenz.

NOVA JARO, NOVAJ PREZOJ

*La nova jaro alportis novajn prezoj por pluraj el niaj eldonaĵoj.
Ĉi-sube vi trovas kelkajn el la titoloj kies prezoj malaltiĝis komence de la jaro.*




La libro de la mirindaĵoj aŭ la priskribo de la mondo. Marko Polo (1225-1324). Esperantigis Daniel Moirand. Rotterdam: UEA, 2001. 445p. 21cm. Ilus. Serio "Oriento-Okcidento", n-ro 34. Prezo: €27,00.



Amo kaj morto en Balio. Vicki Baum (1888-1960). Tradukis P.H. Mooij. Sociologie fascina romano pri la tradicia vivo sur la indonezia insulo Balio. 420p. 21cm. Rotterdam: UEA, 1986. €6,00.




La Kastelo de Vitro. John Francis. Kion Stela kaj Ernesto trovos malantaŭ la pordo al... alia mondo? Rotterdam: UEA, 2004. 197p. 21cm. €9,00.



La vivo de Henriko Kvina. William Shakespeare (1564-1616). Tradukis Humphrey Tonkin. Kvinakta dramo pri la vivo de Henriko Kvina post lia kronado kaj lia strebo al la franca krono. Rotterdam: UEA, 2003. 158p. 21cm. €9,00.



Hamleto, reĝido de Danujo. William Shakespeare. Tradukis L.L. Zamenhof. Postparolo de Humphrey Tonkin. La unua traduko de tiu teatraĵo, kun antaŭparolo kaj klarigo pri dubaj punktoj. En nova vesto. Rotterdam: 2006 (9-a eldono). 223p. 21cm. €9,00.



La vintra fabelo. William Shakespeare. Trad. Humphrey Tonkin. Unu el la kvar dramoj de Shakespeare verkitaj apud la fino de lia kariero kiel verkisto, aktoro kaj teatra entreprenisto en la angla ĉefurbo. Rotterdam: UEA, 2006. 154p. 21cm. €9,00.



Maskerado ĉirkaŭ la morto. Nazimondo en Hungarujo (1965). Tivadar Soros (1894-1968). Redakto kaj komentario de H. Tonkin. Rememoroj de T. Soros pri la holokaŭsto en Budapeŝto. Rotterdam: UEA, 2001 (2-a eldono). 318p. 21cm. €16,50.



IKU-libroj. La prezo de tiuj ĉi popularaj eldonaĵoj malkreskis por ĉiuj haveblaj eldonoj, kaj ĝi restos valida ĝis la elĉerpiĝo de la stokoj. Haveblas la jenaj eldonoj: 1997, 2000, 2001, 2002, 2003, 2004, 2006, 2007, 2008. €7,50.

Ĉe la Libroservo de UEA triona rabato por samtempa aĉeto de minimume tri ekzempleroj de la sama titolo.



Miljara, plena de antikvaĵoj kaj
vidindaĵoj, la mara ĉefurbo
de Pollando

GDANSKO

invitas vin de
la 1-a ĝis la 5-a de aŭgusto 2009
al la interesa renkontiĝo titolita

"GDANSKO – LA URBO
DE SOLIDARECO"

Pri la programo vi povas legi en:
www.esperantowsopocie.pl
www.plama.art.pl



Skribu al: **esperanto.gda@gmail.com**
aŭ al: GAK "PLAMA" – str. Pilotów 11
PL 80-460 GDAŃSK

Facile vi atingos la urbon pere de senperaj linioj:
aeraj, ŝipaj, fervojaj.

Ni precipe invitas la partoprenantojn de la Bjali-
stoka Universala Kongreso, ĉar vi povos facile kaj
gaje alveni al nia renkontiĝo en speciala E-vagono
arangata de la Fervojista Sekcio de Pola Esperanto-
Asocio.

MILJARA URBO – SOLIDARECO – KRUCKAVALIROJ

Kial valoras viziti nin?

La lasta granda E-arango en Gdansk okazis somere
en 1980. Ĝi estis Antaŭkongreso, kiun partoprenis
200 esperantistoj. Feliĉa parto de ili veturis poste per
ŝipo al la Universala Kongreso en Stokholmo. Nun
eblos propraokule kompari la ŝanĝojn, kiuj okazis
intertempe en Pollando, en la loko, kie komenciĝis la
agonio de la terura sistemo en Mezeŭropo.

Laŭ nia nuna kalkulo:

La partoprenkotizo kun tranokto en Hotelo kun
matenmanĝo koston nur **€ 200**.

Por partoprenantoj en Junulargastejo – **€ 150**.